
Driemaandelijks tijdschrift. Afgiftekantoor: Antwerpen X.
ISSN 1013-2031
Jarkolekto 28 - trimonata
4/98

ILEI

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO



Redaktoro:
Jozefo Németh

Vicredaktoro:
Katalin Smidéliusz

Kunlaborantoj:
Stefan MacGill,
Johano Kirsch,
Françoise Noireau,
Atilio Orellana Rojas,
Franz-Georg Rössler

ENHAVO

Estraro de ILEI 1
MAŬRO LA TORRE: *Ĉu la instrufaka terminaro estas sufiĉe matura?* 5
RONALD GLOSSOP: *Preter naciismo al paca tergloba komunumo* 10
Konferenco pri lingvo kaj praktiko (BLAZIO VAHA) 14
TOMISLAV MITROVIĈ: *Pri la novaj metodoj en Esperanto* 20
Reagoj al... (STEFAN MACGILL, VALDO BANAJTIS) 23
El la landoj kaj sekcioj (AU, CL, CN, ES, HU, IT, JP, YU, PL, RU, SE, TR, US, UZ) 24
Interreta paĝaro de ILEI (MAŬRO LA TORRE) 31
Lernejaj interŝanĝoj (ROLAND ROTSAERT) 32
33-a ILEI Konferenco de ILEI en 1999 33
– Pri la Konferenca urbo, Karlovy Vary (PETRO CHRDLE) 33
– Aliĝilo de la Konferenco 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Terza Universitá di Roma, Via del Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. +39-6-4957805, fakso: +39-06-4452642. <m.latorre@uniroma3.it > *Interlernejaj projektoj, komunikiloj, terminaro, reprezentado.*

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. +36 23 364 198. *Lerniloj, komunikiloj.*

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag. Tel. +31 70 355 6677, fakso: +31 70 358 4422. <iei001@worldonline.nl> *Membraro, ekzamenoj.*

Vicsekretario: Jennifer Bishop. 39 Hill Street, Hawthorn, AU-Victoria 3122, Aŭstralio. Tel. +61 3 9818 7358. <esperanto@education.monash.edu.au> *Lernejoj, konferencoj, gimnazio.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio. Tel. +46 415 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Membro: Carla De Lorenzi, via Boston 65, IT-10137 Torino, Italio. Tel. +39 011 390 787. *Trejnado, lerniloj.*

Membro: Antonio Leoni de Leon, 1 rue Chandieu, CH-1202 Gèneve, Svisio. Tel. +41 22 734 2996. <katina.de-leon@ties.itu.int> aŭ <leoni8@etu.unige.ch>*Trejnado.*

ESTRARO DE ILEI

Bertil Andreasson:



Li naskiĝis en 1934 kaj nuntempe estas emerita instruisto de baza lernejo. Andreasson lernis E-on en kurso dum 1957-1958 kaj daŭrigis la lernadon aŭtodidakte. Li estas ILEI-estrarano de 1982 kaj plenumas ties kasistan postenon. Sekciestro de la sveda ILEI-sekcio kaj nuntempe membro de la Direkcio de la Sveda E-Instituto. Andreasson estas ankaŭ prezidanto de la suda distrikto de la Sveda E-Federacio. Membro de UEA kaj fakdelegito de tiu organizo pri instruado.

Jennifer Bishop:

Naskiĝinte Anglion, en E-parolantan familion (avo kaj gepatroj), mi unue konsciiĝis pri nia lingvo en 1947 kiam vizitis nin francaj esperantistoj. Tiu ŝperto vekis intereson pri lingvolernado, tiel ke mi studis la germanan kaj francan lingvojn ĉe Universitato de Southampton, kie mi diplomiĝis ankaŭ kiel instruisto. Edziniĝinte en la sama jaro, 1962, mi vojaĝis kun mi edzo tuj al Universitato Harvard, Uŝono.
1965, reirinte al Anglio, mi komencis instrui la francan ĉe unuagrada lernejo kaj poste la germanan al plenkreskuloj. Post pli ol dudek jaroj, organizinte interŝanĝojn inter Kembriĝo kaj ĝiaj diversaj ĝemelurboj, mi reinteresiĝis pri E-o. Mi membriĝis al la Kembriĝa E-o Klubo.
Elmigrinte kun mia edzo en 1992 al Aŭstralio, mi decidis dediĉi min kiom eble plej multe al E-o. Konscie pri mia entuziasmo, mia edzo, nun Prof-o pri Edukado, decidis kune partopreni Aŭstralian Esperanto-Somerlernejon, kaj por lerni la lingvon kaj por poste prezenti al AEA novan esplor-eksperimenton, nomata EKPAROLI . Ekde la venonta jaro, 1995, mi instruis E-on ĉe tri publikaj unuagradaj lernejoj, uzinte niajn proprajn lernmaterialojn, kreitaj por akompani la unuan provvideon de *Mazi en Gondolando*. Mi instruas al ĉiu klaso, al la nula ĝis la sesa de unu lernejo, Carrum PS. Tre bonŝance 15



gelernantoj povis partopreni la 82-an UKE en Adelaide, kie ili prezentis skeĉon dum Tago de la Lernejo.

Mi estas vicprezidanto de AEA, prezidanto de Melburna E-o Societo, diplomita Cseh-instruisto, sekciestro de ILEI en Aŭstralio.

Carla De Lorenzi:



Mi naskiĝis en Milano (Italio). Mi diplomiĝis kiel librotenisto, steno-daktilografisto, socia edukisto. Mi laboris en diversaj fakoj, kiel administranto, sekretario, instruisto de la angla lingvo, estrino de usona komerca entrepreno. Dum 40 jaroj mi okupiĝis volontule pri maljunuloj, sed lasttempe mi daŭrigis tion profesie en regiona agado, ankaŭ kun junuloj kaj kiel estrino de sociaj kursoj por sociaj asistantoj kaj plenkreskuloj.

En la E-a agado: en 1970 mi helpis organizi la nacian kongreson sur la ŝipo Caribia, kiel kasistino. En 1984 mi organizis en Torino la ekspozicion pri lerneja korespondado. Mi prelegis en Chiavari kaj Rapallo pri Ĉinio. En Francio mi prelegis "Kiamaniere maljuniĝi bone" kaj en Hispanio pri "La vivo de S-ro Cseh". Dum pluraj jaroj mi estis konsilanto kaj estrarano de IEF.Mi estis delegito de UEA kaj nun fakdelegito pri instruado.
Mi havas la 1an, 2an kaj 3an diplomon de la "Instituto Italiano di Esperanto" – la mezan ekzamenon de UEA/ILEI – la diplomon, kiel Cseh-instruisto de IEI – en 1989 en La Chaux-de-Fonds, mi ricevis la ateston de "Instruanto de ILEI/UEA".
Mi gvidis plurajn kursojn en diversaj urboj de Italio. Mi instruis precipe laŭ Cseh-metodo, sed ankaŭ laŭ Zagreba metodo, la aŭdvida metodo de Sekelj kaj laŭ Mazi. En 1996 mi sekvis la BEK-kurson de Prof. Dennis Keefe.
Eksterlande plurfoje mi gvidis kursojn en Francio kaj Svislando. En Hispanio dum kvar jaroj mi gvidis kursojn dum la Internacia Kultura kaj Turisma Semajno en aŭtuno. Pasintjare dum la 5a Internacia Kultura kaj Turisma E-o-semajno en Sant Carles de la Rapita (Taragona) Katalunio-Hispanio mi gvidis kursojn laŭ la Cseh-metodo uzante ankaŭ Mazi-n. Dum 1997 mi instruis en Lugano en februaro. Mi estis invitata instrui en Lyon (Francio) en junio de "Centre Espéranto de la Région Lyonnaise Association Culturelle", kie oni organizis intensivan kurson por komencantoj kaj Seminarion A por Cseh-instruistoj.


Maŭro La Torre:



Naskita en Romo (Italujo), kie li ankoraŭ loĝas, je 1946.11.11, li esperantiĝis en 1962. Doktoriĝis pri matematiko en 1974 kun disertaĵo pri matematika lingviko. Ekde 1974-a dum 15 jaroj li instruis en bazlernejoj, samtempe laborante por instruista trejnado, kunlabore kun itala instruista asocio *CIDI*.
Ekde 1987-a, li laboras en la Klerigscienca Departemento de la Tria Roma Universitato, pri aŭtomatigo en ekzamenado, instru-teknologioj, teleinstruado, komputiko, lingva statistiko, terminologio, lingvopolitiko. En tiuj kampoj li publikigis plurajn verkojn *(http://www.uniroma3.it/lps/p/lato/lm_bib.htm)*.
En la esperantologia kampo, siatempe li membris en la estraro de *IEJ* (Itala E-Junularo), kunlaboris en la terminara komisiono de *IAdEM* (Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj), verkis iujn lernolibrojn kaj artikolojn precipe pri vortaraj kaj terminaj problemoj.
Nuntempe li redaktas lingvopolitikan rubrikon (*Barbarismi*) en instruika fakrevuo *Cadmo*, respondecas pri lerneja instru-eksperimento *ESP²*.koncerne influon de E-lernado al la lingvo-konscia kapablaro, kunlaboras en la konstruado de *LIL* (Lingva Interreta Laborejo), kaj kunordigas la internacian interlernejan edukprojekton *Interkulturo* en la kadro de programo Unesko/*Linguapax*.

Jorge Antonio Leoni de Leon:

Naskiĝinta en 1970, kostarikano. Magistro pri hispana filologio. Membro de UEA ekde 1991, delegito ekde 1993. Instruis unuafoje en la lando priesperantan oficialan kurson en la Universitato de Kostariko (1991) kaj semestran E-kurson (1993). Volontulis en la CO en 1993. Ĉefa reaktiviginto de la kostarika movado. Kunfondis kaj prezidis Universitatan E-Klubon "Carlos Gagini" (1992) kaj Kostarikan E-Asocion (1996); nun vicprezidanto de KREA. Prezidis la LKK-on de la Tria Amerika Kongreso de E-o (1997). Reprezentanto de ILEI en Kostariko 1994-97. Partopreninto de la Konferenco de ILEI en Porvoo, Finnlando (1995).



Studinto de la supera kurso de E-o de San Francisco State University (1992) kaj sukcesinto de la Meza Ekzameno de E-o UEA/ILEI (1992). Faris la "A" Cseh seminarion en Kostariko en 1992.

Stefan MacGill:




Naskiĝis en Lower Hutt, Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto. Kunfondinto de E-a Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972. Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis kiel instruisto por elementaj lernejoj en 1974.
Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de Jarlibro (76-86), teknika redaktoro de Kontakto (78-86). Vicprez. de TEJO (77-79), prez. (1979-80). Direktoro de CO (1980-84). Redaktoro de Juna Amiko (1986-96). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95).

Profesie ekde 1989 verkas manlibrojn kaj help-tekstojn por komputilaj programoj (optika karaktro-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas E-ajn instrumaterialojn. Interesiĝas pri transporto; precipe fervojoj kaj iliaj horaroj.

Vivas en Hungario de post 1986. Havas du filinojn, Karina (1990) kaj Hajnal (1992), ambaŭ denaskaj esp-istoj.

Verkis 21 eldonaĵojn, 14 en E-o, inkluzive "Tendaraj Tagoj", kajeroj 1 (2 eldonoj), 2 (2 eldonoj), kaj 3 , kaj planas ankoraŭ 8 eldonaĵojn ekde julio 1998, inkluzive instruistan gvidilon por la dua kajero de "Tendaraj Tagoj", reeldonon de la 1-a kajero, kaj novan kurson por 8-jaruloj en la projekto Interkulturo.

Atilio Orellana Rojas:



Li naskiĝis en 1963 en Argentino. En la Nacia Universitato de Cordoba (Argentino) li diplomiĝis kiel magistro pri klasika filologio kaj en tiu sama institucio li poste instruis romanistikon. En la lernejo "Alexander Pushkin", en Cordoba, post 4-jara studperiodo, li atingis la titolon de instruisto de la rusa lingvo kaj iom tuj post tio li ekinstruis tiun lingvon en tiu sama instituto. Li realigis studojn ankaŭ pri filozofio kaj teologio ĉe la filio de la Gregoria Vatikana Universitato en Argentino.

Pro sia forta intereso pri kompara gramatiko, li studis diversajn aliajn lingvojn (portugalan, hebrean, germanan, francan, keĉuan, svedan).

E-on li lernis aŭtodidakte en 1984 kaj iom poste, konatiĝinte kun Cseh-metodo, sekvis la diversŝtupajn seminariojn kaj en 1990 dum la ILEI-Konferenco en Hanabanillas (Kubo) diplomiĝis kiel Cseh-instruisto kaj en 1992 kiel gvidanto de seminarioj pri Cseh-metodo.
De kelkaj jaroj li vizitas diversajn landojn por instrui rektmetode E-on en malsimilaj niveloj. Li jam gvidis kursojn en 5 kontinentoj en pli ol 50 landoj. Li realigis prelegvojaĝojn en pluraj landoj por diskonigi plurajn aspektojn de la indiĝenaj kulturoj de Ameriko, iliaj lingvoj, muziko, ktp.
Li vaste verkis kaj hispane kaj E-e pri ĉi tiuj temoj kaj tio aperis en kelkaj E-revuoj kaj en specialigitaj revuoj en Argentino.

En la E-movado li jam plenumis diversajn oficojn kaj daŭre estas diversgrade engaĝita. En ILEI li membras de 1989 kaj de 1993 li estis Reprezentanto por Ameriko en la Internacia Ekzamena Komisiono de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. De 1995 li estas estrarano de ĉi tiu organizo kaj li respondecas pri Konferencoj kaj Ekzamenoj.
Ene de UEA li plenumas la rolon de Komisiito pri Amerika Agado de 1994 kaj estas daŭra kontribuanto al la paĝoj de "Kontakto".

NdlR – Ĉi-supre ni publikigis biografiajn notojn pri la anoj de la nova estraro, por ke ĉiuj ILEI-anoj ekhavu ideon pri la spertoj, interesoj, kompetentecoj de ĉiu el ili. Koncerne la estontecon de nia Ligo, en la venontaj numeroj ni intencas prezenti al vi resume la planojn, kiujn la estraranoj kaj komisionestroj estas pretigantaj pri siaj agadoj en la respektivaj kampoj.

Maŭro La Torre

Ĉu la instrufaka terminaro estas sufiĉe matura?

1. Uzado de la Internacia Lingvo en instrua kampo.

Kiel E-instruistoj (kaj ILEI-anoj) tradicie plej multe uzas E-on rilate kun sia profesio? Ni konsideru tri tipajn ekzemplojn.
a) Iuj instruas la lingvon al siaj klasanoj, kiuj eventuale aplikas ĝin en interklasa korespondado.
b) Iuj kongresas, konferencas, kunsidas kun alilandaj kolegoj, kie plej ofte oni parolas

pri instruado aŭ instruindeco de E-o, tre ĝenerale, sen detala diskutado pri instru-teknikaj aspektoj.

c) Ĉiuj pli-malpli legas gazetarajn artikolojn pri iniciatoj koncerne diversnivelajn lernejajn kursojn aŭ porinstruistajn trejnadojn, kiel ankaŭ ili legas recenzojn pri instrumaterialoj.
En la menciitaj kazoj temas, aŭ *(a)* pri lernigo de simpla baza vortprovizo, aŭ *(b, c)* pri uzo de terminoj ne tre fakaj *(lernejo, instruisto, lernolibro, gramatiko, vortaro, universitato, direktoro, ...)*, aŭ de terminoj kiuj ne bezonas - en tiu situacio - ekzaktan kaj tute certan komprenon *(gimnazio, diplomo, trejnado, edukado, ekzameno, noto, profesoro, ...)*.

En la pasinteco malofte okazis ke diverslandaj instruistoj devis kunlabori E-lingve pri strikte profesiaj temoj, kiel ekzemple la kolegoj de ia internacia gimnazio, kiuj konkrete kaj detale planas kune siajn lecionojn, aŭ kiel la anoj de internacia ekzamena komisiono, kiuj prijuĝas la ekzamenajn taskojn, aŭ kiel AIS-profesoroj, kiuj diskutas pri studkarieroj de kandidatoj.

En la estonteco, kaj jam en la nuno, la internacia kunlaborado, ne nur inter registaroj kaj grandaj entreprenoj, sed ankaŭ inter simplaj fakuloj rimarkinde plioftiĝos. Aparte pri lernejoj okazas, ne nur la iama korespondado, sed kunlaborado de instruistoj en komunaj internaciaj edukaj projektoj, interŝanĝa gastigo de klasoj, lernado de studentoj en aliaj landoj por difinita periodo.

E-o povas ludi gravan rolon en tiaj internaciaj kunagadoj, ne nur en grandaj tutmondaj projektoj, sed ankaŭ en malgrandaj malmultklasaj kunlaboradoj iniciatitaj far kelkaj instruistoj.
Sed kiam temas pri praktika ĉiutaga lerneja laboro, pri instruplanoj, pri studkarieroj, pri komputilhelpa lernado, pri rilatado kun instru-ministerioj aŭ internaciaj eduk-instancoj, ĉu nia faka lingvo estas sufiĉe matura por vere klare interkompreniĝi?
Mi rakontu nur unu simplan modestan, sed tre freŝan, ekzemplon. Kolegino riproĉetis al mi ke mi menciis la kursaron, kiun ŝi direktas, kiel "perfektiga" dum ĝi estas "postdiploma". Mi naive supozis ke la du terminoj en tiu lando estas sinonimoj, kiel ĉe ni. Sed post la protesto, mi eĉ ekdubis ĉu mi ĝuste interpretis la tiean koncepton de "diplomo". Tio estas nur unu ekzempleto, sed da tiaj ĉiu el vi povus rakonti aliajn: eĉ estus interesa ideo kolekti tiajn ekzemplojn de miskompreno!

Ĉu? Ni povas lanĉi ĉi tie en IPR **rubrikon pri terminaj demandoj** en lerneja kaj pedagogia kampo.

2. Fidindaj terminaroj.

Kion ni bezonus por trankvile uzi nian lingvon pri instruaj temoj, sen riskoj kaj duboj pri miskompreno? Evidente ni bezonus **fidindan terminaron**, pli klare utiligebla ol la nuna ***PIV***, kiu, sovaĝe registrinte la ĝisnunajn spontanajn uzojn, disvastigas lingvan konfuzon anstataŭ firme proponi esprimaĵojn klarajn por ĉiuj.
Ankaŭ ĉi tie mi alportu anekdoton. Kolektante por Interreta paĝo adresojn de lernejoj, kie troviĝas E-kursoj aŭ E-instruistoj, mi renkontis plurajn kazojn de institucioj, kiuj nacilingve havas nomon forme similan je *kolegio* (ekz. la anglalingva "college"). En tiaj kazoj, se oni ne precize konas ĉiujn landajn instrusistemojn, oni povas dubi pri kia lernejo aŭ studentejo temas laŭ nivelo kaj socia fermiteco. Kaj kion signifas "kolegio" en E-o? Jen legu mem la koncernan paragrafon de *PIV*.

kolegi[1]o

1 Aro da personoj plenumantaj religian oficon: *la kolegio de la pontifikoj, de la aŭguroj, de la kardinaloj*.
2 (en Anglujo) Supera lernejo ĉe universitato: *la kolegioj de Kembriĝo*.
3 Mezgrada lernejo gvidata de Jezuitoj.
4 (en Francujo) Mezgrada lernejo.

Kompreneble oni povus facile daŭrigi tiustile: "5 (en Italujo) Internulejo, kie lernantoj loĝas kaj lernas kune, malproksime de propraj familioj", ktp.
Do, laŭ nia plej granda kaj konsiderata vortlibro, tiu termino, kiel multaj aliaj pri instruado, ne havas propran signifon en nia lingvo, sed ĝia signifo dependas de la lando kaj kulturo de la parolanto (aŭ ĉu de la alparolato? aŭ de la priparolaĵo?).
Tiaj plursencaĵoj devenas de misinterpreto de la fifama "15-a regulo" de la Fundamento de E-o: "La vortoj "fremdaj", t.e. tiuj kiujn la plej multaj lingvoj pruntis el la sama fonto, ne ŝanĝiĝas en E-o. Ili alprenas nur la skribmanieron kaj la gramatikajn finaĵojn de la lingvo. [...]". Tamen ĉi-kaze temas pri **vortformo** simile kaj samfonte ekzistanta en multaj lingvoj, sed **malsamsignife** komprenata en la diversaj landoj. La etima ŝanĝiĝado de la vortoj estas interesa fenomeno el kulturhistoria vidpunkto, tamen en unu aparta lingva komunumo kiel la E-lingva, por efike labori, oni bezonas klare kompreni la signifon de la vortoj, sen konsulti ĉiufoje kulturgeografiajn enciklopediojn.
La supra ekzemplo estas unu el dekoj similaj. Pensu nur pri kio vere signifas por la E-parolantoj vortoj kiel *pedagogo, akademio, profesoro, doktoro, rektoro, noto, diplomo, gimnazio, mezlernejo, infanlernejo, infano,...*

Kompreneble en la instrua tereno la termina problemo estas aparte delikata kaj tikla, ĉar ne nur la vortoj, sed ĝuste la nocioj varias laŭ landoj kaj regionoj, laŭ

pedagogiaj skoloj, laŭ historiaj periodoj, kaj eĉ laŭ ĉu parolas instruisto, filozofo pri edukado, aŭ burokrato.
Tamen, se ni volas superi tian malcertan komunikan situacion, ni devas ekpensi pri **komune akceptata terminaro**, kiu respektante la kulturajn malsamecojn, ebligu al ni labori en nia profesio, per memstara kaj klara lingvaĵo.

Kia estu tia fidinda, klara kaj utila terminaro?

Ĝi entenu almenaŭ la plej uzatajn **E-ajn terminojn** koncernantajn la lernajn kaj instruajn procezojn, eventuale **klasigitaj kaj interrilatigitaj laŭ temoj** (instru-teknologio, lerno-taksado, instru-sistemoj, metodiko, psikaj kaj sociaj aspektoj de instruado, edukpolitiko kaj edukfilozofio, ktp.).
La proponataj terminoj ne apogiĝu sur tradukoj, sed baziĝu sur **difinoj** kaj/aŭ uzaj **ekzemploj**.
Poste oni povas aldoni laŭplaĉe nacilingvajn **tradukojn**.

3. De kie komenci la laboron?

Terminaran laboron principe oni povas aranĝi laŭ pluraj diversaj strategioj kaj teknikoj.

A) Verkante, aŭ kvazaŭ verkante, manlibron pri fundamentaj instrusciencoj, oni povas priskribi la bazajn nociojn koncernantajn lernadon kaj instruadon (lernantoj, lerniloj, instruantoj, instruceloj, instruiloj, instrumetodoj, instrusistemoj, lernomedioj, ktp.), laŭ iuj modeloj kaj teorioj, samtempe atribuante E-an **nomon** je la difinataj konceptoj. (1)

B) Elekti E-lingvan **tekstaron** pri instruikaj temoj (ekzemple la jarkolektojn de *IPR*), kaj trakribri ĝin, eltirante ĉiujn renkontatajn fakajn terminojn, eventuale kun ekzemplaj kuntekstaĵoj. (2)

C) Baziĝi sur jam ekzistanta **plurlingva fakterminaro**, kiom eble fidinda kaj aŭtoritata - do kun difinoj - (ekzemple la publikaĵoj de internaciaj organizoj pri instruado kaj edukado)(3), kaj serĉante E-ajn ekvivalentojn por la tie entenataj terminoj.

D) Analizi la ekzistantajn **E-ajn vortlibrojn** (internaciajn kaj naciajn), eltirante el ili ĉion, kio koncernas la lern-instruan terenon, celante la atingon ne de simpla vortlisto, sed de koheran noci-sistemon.

Kion povas fari tiukoncerne *ILEI*, per siaj malabundaj rimedoj? Pri la tuta instru-termina problemaro, kaj aparte pri la preferinda labormaniero, jam okazis en la lastaj jaroj pluraj diskutoj, studoj, prelegoj (4), kaj eĉ iom da korespondado inter ILEI-anoj interesataj kunlabori en tiu kampo. Dume *UEA*, zorge de sia *TEC* (Terminologia E-Centro) jus eldonis legindan libreton pri la ĝeneralaj principoj kaj teknikoj por profesia terminografia kaj terminologia laboro. (5)
El la lasta ILEI-Konferenco (Montpeliero, Francujo, 1998) okazis eta kunsido de interesatoj pri terminara laboro. Post diskuto pri la supre diritaj alternativaj ebloj, oni elektis la lastan *(D)*, la plej simple kaj klare aranĝeblan, ne bezonantan grandan organizon kaj aparatarojn.
La konkreta propono estas komenci eltiri el *PV* (Plena Vortaro) ĉiujn terminojn interesajn por lern-instruaj procezoj:
- reviziante ties difinojn,
- referencante al la vortoj iel parencaj (subsignifaj, supersignifaj, samsignifaj, ktp.),
- proponante nacilingvajn tradukojn (laŭ la lingvo de la kunlaboranto).

Verŝajne konvenos fari (samtempe) la saman laboron en *PIV* (Plena Ilustrita Vortaro).
Jam kelkaj homoj sin proponis por tia kunlaborado, sed aliaj ja bonvenos, por kovri kiom eble plej multajn kompetentecojn (subfakojn), naciajn lingvojn kaj regionajn kulturojn.

Do, konklude:

1. Se vi havas diskutindajn terminajn problemojn pri lernado, proponu ilin al ni, por la starigota termina rubriko de *IPR*.
2. Se vi volas partopreni en la supre menciita laborgrupo pri PV kaj PIV, anoncu vin.

Maŭro La Torre

Notoj:
(1) Ĉi tiu aliro ankaŭ proksimas tiun de temvortaroj, pri kiu parolis Ilona Koutny en la "Tago de la lernejo" (Universala kongreso de E-o, Montpeliero, 1998).
(2) Tia laboro kunligiĝas kun la lastatempaj proponoj pri konstruado de komputeblaj tekstobankoj. Vidu ekzemple Miroslav Malovec, "Disponigi nian kulturon al ĉiuj", en Eventoj, n. 148-148, 1998
(3) Ekzemple: Eŭropa Konsilantaro / Eŭropa Komisiono, Eŭropa Tezaŭro pri Edukado, 1991 (versioj en multaj naciaj lingvoj), ISBN 92-77-72425-0
(4) Vidu ekzemple: La Torre M., "Ĉu instruistoj interkompreniĝas?", Esperanto, n. 1078, 1996; La Torre M., "Desuprismo kaj desubismo en terminara laboro", IKU, Adelajdo, 1997
(5) Heidi Suonuuti, *Terminologia gvidilo*, 1998, Roterdamo, UEA/TEC, ISBN 92-9017-057-3

Ronald Glossop

Preter naciismo al paca tergloba komunumo

(prelego verkita por la 32-a ILEI Konferenco en Montpeliero)

Ni vivas dum gravega momento en la historio de la homaro. Nia homara socio nun transiras de kolekto de iom apartaj naci-ŝtatoj al unuopa tergloba komunumo. Por instruistoj, kiuj laboras kun gejunuloj, ĉi tiu transiro en la homa vivmaniero estas tre grava. Nia tasko estas prepari gejunulojn vivi ne en la mondo, kiun ni konis, sed en la mondo de la estonteco, kie ili vivos. Kia defio! Kiel ni scias – kiel iu ajn scias – kia estos la mondo en la estonteco? La ŝanĝoj eble estos tiel variaj, ke multe da tio, kion ni instruos al ili, estos neutila. Tamen ni devas peni prepari niajn gejunulojn kiel eble plej bone.

En la nuntempa mondo oni ricevas la identecon plejparte laŭ la nacia komunumo, kie oni naskiĝis, sed tia mondo nun malaperas. Ĝi certe ĝis nun ne tute malaperis. Tamen ni povas vidi la malkreskantan influon de la nacia komunumo. Tio estas la situacio, ĉu ni pensas pri la etna nacia komunumo aŭ pri la politika naci-ŝtato. La tutmonda komunikado kaj la facila vojaĝado de lando al lando havas la rezulton, ke eĉ infanoj ne plu estas enfermataj en la nacia komunumo, kie ili hazarde naskiĝis. Iliaj horizontoj estas pli vastaj ol tio. Ili vivas en tergloba komunumo – granda ŝanĝo, kiun ofte iliaj gepatroj kaj geavoj ankoraŭ ne agnoskas.
La plenkreskuloj nur malrapide akomodiĝas al la ŝanĝoj, kiuj nun okazas. Kiam ni rigardas la politikajn instituciojn kaj la lingvajn politikojn, kiujn ili adoptas, ni povas vidi kelkajn laŭgradajn ŝanĝojn. Tamen ekzistas multaj oponantaj tendencoj. Eĉ tiuj homoj, kiuj adoptas pli vastan vidpunkton emas pensi rilate al internaciismo anstataŭ terglobismo. Plue, eĉ la internaciismo kutime ankoraŭ enhavas grandan dozon de naciismo.

Mi konsideru detale ĉi tiun distingon inter internaciismo kaj terglobismo. Internaciismo vidas mondon de individuaj naci-ŝtatoj. Kelkfoje iliaj registaroj kreas internaciajn instituciojn por helpi kunlabori unu kun la alia. La taŭga figuro por la internaciisma vidpunkto estas mapo de la mondo, kie la diversaj landoj estas bildigitaj en diversaj koloroj. Difinita linio trovĝas ĉirkaŭ ĉiu. Terglobismo, male, vidas la mondon kiel unuopan planedan komunumon. La taŭga figuro por la tergloba vidpunkto estas foto de la Tero rigardata el la spaco. Tie oni ne vidas altrudatajn landlimojn.

La taŭga speco de politika institucio por internaciisma mondo estas internacia organizaĵo kiel Unuiĝinta Naciaro. Ĝi estis kreita de la landaj registaroj por ilia propra bonfarto. Memoru, ke la reprezentantoj de la landaj registaroj, kiuj konsiliĝi kaj adopti rezoluciojn ĉe Unuiĝinta Naciaro, estas senditaj tien de la landaj registaroj por prizorgi la nacian bonfarton. Ili estas pagitaj de la landaj registaroj por fari tion, kio estas bona por tiu registaro. Se tiuj diplomatoj iam ajn meti la bonfarton de la monda komunumo super la bonfarto de sia propra lando, ili baldaŭ perdos sian postenon. Eĉ la dungitoj de U.N., kiel la Sekretario-Ĝenerala, devas esti gvidataj ne laŭ tio, kio estas bona por la mondo, sed laŭ tio, kio ne ofendos la pli potencajn landajn registarojn.

La taŭga politika institucio por la tergloba komunumo estus demokratia tutmonda federacio, kie la homoj de tiu monda komunumo elektus reprezentantojn al monda parlamento. Ili farus leĝojn por trakti terglobajn problemojn, kiujn la tergloba komunumo alfrontas. Ĉi tiuj reprezentantoj estus pagitaj de la tutmonda registaro, kvankam ili ankoraŭ devus esti elektitaj de la homoj, kiujn ili reprezentas. La nuntempa internacia leĝo traktas ĉefe la interreagojn inter naci-ŝtatoj, sed la terglob-orientataj leĝoj de monda parlamento traktus konduton de individuaj personoj. Oni ne plu uzus armeojn aprobitajn de U.N. por peni puni naci-ŝtatojn aŭ naciajn grupojn pro malpermesita konduto, kiel okazas en la nuntempa internacia sistemo. Male, nur tiuj individuoj, kiuj malobeas la leĝojn, estus juĝitaj kaj, kiam necesas, persekutitaj. Ni havus novan situacion, simila al tio interne de naci-ŝtatoj, kie la paco estus konservata de policanoj, kiuj povus malliberigi individuojn.

Sed ĉi tiuj aferoj, kiujn mi ĝis nun pritraktis, estas nur akcesoraj al mia ĉefa punkto pri la diferenco inter internaciismo kaj terglobismo. Mi volas atentigi al vi la malsamajn lingvajn politikojn inter internaciisma mondo kaj terglobisma mondo. En internaciisma mondo elektitaj naciaj lingvoj estas uzataj en internaciaj organizaĵoj. Oni dungas interpretistojn kaj tradukistojn por helpi komunikadon inter malsamaj naciaj grupoj. Ĉar ekzistas tro da naciaj lingvoj, por permesi la uzon de ĉiuj el ili, oni devas doni specialan statuson al la naciaj lingvoj de la pli potencaj naci-ŝtatoj. Tiuj lingvoj fariĝas la oficialaj lingvoj de la internaciaj instancoj.
La rezulto estas, ke la homoj en aliaj landoj estos devigitaj lerni tiujn "ĉefajn" lingvojn krom sian propran nacian lingvon. Tiuj "ĉefaj" lingvoj iom post iom iĝos pli gravaj eĉ ekster la registaraj internaciaj instancoj. Tio okazas ĉar tiuj estas la naciaj lingvoj, kiujn pli da personoj povas uzi. La "neĉefaj" naciaj lingvoj – kaj eĉ pli, la etnaj lingvoj, kiuj ne estas antaŭenigataj kiel landaj lingvoj – estas iom post iom marĝenigataj. Rilate al la edukado de la gejunuloj, la proklamata politiko estas multlingvismo, sed ne ĉiuj lingvoj estas egale rangitaj inter tiuj lingvoj, kiujn oni devus lerni. Sekve la efektiva rezulto estas, ke la lingvoj de la pli potencaj ŝtatoj

iĝos ĉiam pli gravaj "ĉefaj" lingvoj. La lingvoj de la malpli potencaj ŝtatoj iĝos ĉiam malpli gravaj "ne-ĉefaj" lingvoj. Fine, nur unu (aŭ eble du) naciaj lingvoj restos en la konkurenco. Ni povas vidi, ke tia situacio jam okazas en la mondo. Ĝis nun la angla estas la evidenta gajnanto, dum la franca, la hispana, la germana, kaj la ĉina batalas pri la dua rango.

Male, en terglobisma mondo la lingvodemando estus: Kiu lingvo finfine estus plej bona por la tuta tergloba komunumo? Demokratia tutmonda federacio povus trakti la demandon en konsiliĝa maniero. La plej efika sistemo evidente estus havi unusolan lingvon por la tergloba komunumo. La plej bona lingvo por la tutmonda komunumo devus esti lingvo, (1) kiu estas naci-neŭtrala; (2) kiu estas ne tro malfacila lerni; (3) kiu estas facile uzebla kaj parole kaj skribe; (4) kiu povas esprimi ĉiujn el la diversaj specoj de aferoj, kiujn tia lingvo povu esprimi; kaj (5) kiu estas efektive uzita de iu komunumo dum iom da tempo por certigi, ke ĝi vere povas funkcii. Konsiderante la tendencon de nuntempa teknologio, ni aldonu, ke la tergloba lingvo devus esti senprobleme lernebla de komputiloj. Komputiloj devos povi kompreni ordonojn prezentitajn kaj parole kaj skribe, kaj ankaŭ povu disdoni informojn kaj parole kaj skribe. Evidentas al multaj el ni, ke la lingvo, kiu plej bone plenumas ĉi tiujn postulojn, estas E-o.
Kiam ni rigardas la estontecon kaj la taskon eduki niajn junulojn por la mondo, en kiu ili loĝos, ni alfrontas grandegan defion. La landaj registaroj, kiuj plej forte influas la karakteron de la edukado de niaj gejunuloj ne sukcese vidas tion, kio estas bezonata. Plejparte la registaroj ne forlasis naciismon kaj la celon pleje gravigi la lojalecon de siaj gejunuloj al la landa komunumo kaj al la nacia lingvo. Tia edukado celas prepari ilin por iĝi plenkreskuloj, kiuj batalos kaj subtenos militojn de la landa komunumo kontraŭ aliaj landaj komunumoj senkonsidere tion, kio estas plej bona por la tuta mondo.

En Eŭropo multaj landaj registaroj moviĝas preter naciismo al internaciismo, aŭ almenaŭ regionismo. Ili antaŭenigas multlingvismon kaj la nocion, ke iu ajn gejunulo devus povi iri ien ajn en Eŭropo. La gejunuloj devus povi vizitadi universitatajn klasojn aŭ trovi laboron sen ia ajn lingva problemo. Sed oni neniam povos efektivigi tiajn celojn. Jam ekzistas dek unu oficialaj lingvoj en Eŭropa Unio. En Eŭropo ekzistas ankaŭ aliaj regionaj lingvoj, kiel la bretona kaj la kimra kaj la kataluna kaj la vaska. Plue, Eŭropa Unio probable baldaŭ etendiĝos por inkluzivi almenaŭ tri aliajn landojn (Polio, Ĉeĥio, kaj Hungario). Tiam estos tri aldonaj lingvoj. ĉu estas vere praktikeble, ke granda nombro da gejunuloj lernos kvin aŭ ses lingvojn sen mencii dek tri aŭ dek kvar? Ĉi tia multlingva politiko havos nur la rezulton, ke la rolo de la angla estos pli fortigita, ĉar por ne-anglaj parolantoj la angla preskaŭ ĉie estas la unua fremda lingvo lernenda.

Plue, tia Eŭrop-centrigita aliro estos taŭga nur dum eble kelkaj dekjaroj. La tasko lerni multajn diversajn Eŭropajn lingvojn estas tre malfacila. Sekve, ne estas surprizo, ke la plejparto de Eŭropanoj havas malgrandan intereson pri la lernado de la ĉina, la japana, la araba, aŭ la hinda. Tamen la mondo inkluzivas ne nur Eŭropon kaj la Amerikajn landojn sed ankaŭ Azion kaj Afrikon. Ia ajn internaciismo, kiu ne agnoskas ĉi tiun gravan fakton, devus ne eĉ esti nomita "internaciismo" sed anstataŭe "Eŭropanismo." Tia limigita regionismo estas eĉ pli malproksima de terglobismo ol la pli tradicia internaciismo, kiu almenaŭ konsideras la tutan mondon.

La zorgoj de la landaj registaroj montras, ke ilia vido de la estonteco estas fokusita plejparte al naciismo kaj regionismo. Ŝajnas, ke ili ne povas fari la transpason al terglobismo. La land-estroj plejparte ne volas pensi pri la mondo kiel unuopa komunumo. Sekve, ni mem devos mastrumi la edukadon de niaj infanoj kaj geavoj kaj iliaj kunjunuloj. Ni devas doni al ili la vidon de tergloba komunumo, kiu estas jam aŭgurigita de nia E-komunumo. Ni devas instrui ilin preteriri la identecon kun la nacio, kie ili hazarde naskiĝis. Ni devas fokusi ilian atenton al la tergloba komunumo, kie ili povos trovi novan identecon. Ni devas instigi ilin pensi pri si mem ne rilate al la nacia komunumo, al kiu iliaj gepatroj apartenis, sed rilate al la tergloba komunumo, en kiu ili vivos. Ni devas instrui ilin pri la principoj tiel elokvente deklaritaj en nia Manifesto de Prago: (a) la valoro de demokratia komunikado, kiu permesas la partoprenado de ĉiuj; (b) la valoro de edukado, kiu transcendas naciajn kaj regionajn limojn; (c) la valoro de lingva lernado por ĉiuj homoj, ne nur malmultaj; (ĉ) la valoro de multlingvismo por ĉiuj homoj; (d) la valoro de la respektado de ĉies lingvaj rajtoj; (e) la valoro de la lingva diverseco eĉ dum ni iĝas unuopa tergloba komunumo; kaj (f) la valoro de la ebleco libere esprimi la pensojn al aliuloj kaj asocii kun aliuloj ie ajn en la mondo senkonsidere la naciecon. Plej grave, ni devas serioze instrui ilin pri E-o kaj ofte komuniki kun ili E-e, por ke ili sentu hejme en la tergloba komunumo, de kiu ni ĉiuj estas membroj.
Mi opinias, ke multaj geinstruistoj kiuj instruas E-on al infanoj jam konas la kanton, kiun mi nomas nia "monda himno por infanoj." La melodio venas de la konata franca kanzono "Frère Jacques". La teksto verkis Charlotte Kohrs de San Diego, Kalifornio, Usono, la fondintino de "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo." Ŝi verkis la kanzonon por infanoj en la tuta mondo, kiuj lernas E-on. La teksto estas:

"Sur la Tero, bela Tero,
Loĝas ni, kantas ni,
Kune sur la Tero, Monda familio,
Famili', famili'."

Mi esperas, ke ĉiuj el niaj E-aj gelernantoj daŭre kantos ĉi tiun infanan kanzonon

por la tergloba komunumo, aparte dum "Ago Tago" por infanoj (iu tago de via elekto dum la dua aŭ tria semajno de Februaro). ĉi tiu kanzono montras en mirinde konkreta maniero la sintenon, kiun ni devas evoluigi en niaj gejunuloj por moviĝi preter naciismo kaj landaj registaroj al pacema tergloba komunumo.

NOTOJ

1) Vidu Ronald J. Glossop, "Language Policy and a Just World Order" ["Lingva Politiko kaj Justa Monda Ordo"], Alternatives, XIII (1988), 395-409, aparte p. 404.
2) Esperanto, Septembro 1966 (N-ro 1084), p. 146.

Ronald J. Glossop,
Profesoro de Filozofiaj Studoj kaj Kunordiganto de Pac-Studoj,
Sud-Ilinoja Universitato en Edŭardsvilo, Edwardsville, IL 62026-1433, Usono

Konferenco pri lingvo kaj praktiko

en urbo Szombathely, Hungarlo (16-18. 05. 1998)

[NdlR – sen la piednotoj, pro manko de loko]

La 8-a Hungaria Konferenco pri Aplikata Lingvistiko estas priraportita aŭ menciita eble de pli da personoj ol mi supozas - mi ne trarigardis la gazetaron. - Detlev Blanke en sia artikolo aperinta sub titolo "*Interlingvistiko: samrajta ĉeesto*", krom doni inventaron de la priesperanta programo (vd. ankaŭ sube), atentigis pri la sekvaj pozitivaĵoj: kompetenta organizado fare de Katalin Smidéliusz, prezento de E-aj temoj ankaŭ ekstersekcie, por publiko lingvista-neesperantista, Ronda Tablo dediĉe al István Szerdahelyi (Esperanto, n-ro 1105, 1998, n-ro 7-8., p. 141).

La konferenco havis titolon kiu esprimas eble la eniremon en la noblasencan Eŭropon de la organizantoj, kaj ankaŭ la utiligemon pri ĉiaj konoj kaj kiu distingas la konferencon disde konferencoj ĝenerale aŭ etne lingvistikaj: La lingvo kiel intelekta kaj ekonomia kapitalo.
La konferencaj lingvoj estis la lingvo *Hungara* kaj lingvo laŭ *elekto* de la preleganto: jen libereco pri lingvo, en kiu ankaŭ E-o trovis hejmon sen specialaj klarigoj (se mi ne eraras).
Pli ol klarigoj montros la karakteron de la konferenco simpla vicigo de la sekcionomoj (kiel Katalin Smidéliusz estis ilin, plus la tutan programon kaj aldonajn informojn) dissendinta, en E-o:

Interkultura komunikado kaj EU-dokumentoj
Sociolingvistiko kaj aplikata sociolingvistiko
Lingvaj rajtoj (de lingvaj komunumoj, instruistoj kaj lernantoj)
Komputilo kaj lingvistiko - Interreto
Psikolingvistiko kaj aplikata psikolingvistiko
Du- kaj plurlingveco
Specialaj komunikaj problemoj (afazio, disleksio, ktp)
Surdeco kaj aplikata lingvistiko
Kontrastiga lingvistiko
Tradukado, interpretado
Interlingvistiko, esperantologio
Esploro kaj instruado de faklingvo, evoluigo de akademiaj kapabloj
Lingvopedagogio
Historio de lingvoinstruado
Aplikata tekstolingvistiko, stilistiko
Aplikata lingvistiko en la gepatralingva edukado
La hungara kiel fremda lingvo
Entreprena komunikado

Oni organizis ankaŭ liberajn diskutojn "je" ronda tablo. Pri nia priesperanta rondatablumo mi skribos iom pli poste. Aliaj diskuttemoj estis la hungara lingva normo, kun la speciala demando, kiom da normocentroj ekzistas. Praktike oni demandas, ĉu Hungaroj ekster Hungarujo rajtas sekvi normojn diferencajn de la Budapeŝta. Interreto en lingvoinstruado estis alia temo (ankaŭ ni povus tie raporti pri kelko, sed ni ne uzis nian eblon). La Forumon de aplik-lingvistoj el Mez-orienta Eŭropo - mi ne ĉeestis, sed eble iuj demandis aliajn, kio propre estas lingvoleĝo.

La programo de la sekcio pri interlingvistiko estis:
Detlev Blanke: Eugen Wüster kaj la naturalisma skolo
Ilona Koutny: Fonetikaj aspektoj de E-o
Péter Murány: La vorto E-o *en komputilaj datumbazoj*
Blazio Vaha: Duagradaj funkcioj de gramatikaj rimedoj en E-o
Otto Prytz Lingva komunikado kiel problemsolvado
Árpád Rátkai: Komencoj de la hungara E-movado
Katalin Smidéliusz: Internaciaj eksperimentoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto
Giorgio Silfer: La esperantistaro: ĉu lingva minoritato?
Zsuzsa Varga-Haszonits: Lingvistikaj konceptoj de István Szerdahelyi.

Tri el ni - Detlev Blanke, Ilona Koutny kaj Árpád Rátkai - prelegis ankaŭ en aliaj

sekcioj - en la sekcio pri *"La Hungara kiel fremda lingvo"*, en la sekcio pri *Lingvopolitiko* kaj en tiu pri *Leksikologio-leksikografio.*

Ilona Koutny: La hungara kiel fremda lingvo
Árpád Rátkai: Pri lingva diskriminacio
Detlev Blanke: Pri la rilatoj inter terminologio-scienco kaj la Enciklopedia Vortaro de Eugen Wüster - en la Germana.

La kongreson partoprenis ĉ. 400 personoj, la programo estis abunda - tial estas grave mencii, ke oni planis tre zorge la dividon de la sekcioj – post antaŭaj opini-esploretoj oni faris uzindan programkajeron, kaj disvolvis bonan informadon - afiŝan kaj buŝan - dum la kongreso mem.
Plendoj kaj memkritiko de la organizantoj okazis pri la prezento-tempo: 15 minutoj ne sufiĉas. Aliflanke, lingvistino ne partoprenema pretekstis (?), ke en ĉi tiu serio de konferencoj oni tradicie ne observas tempolimojn. Nu, en nia sekcio estis konvena tempouzo - ni mem decidis distrancî la tempon de la forestantoj.

Katalin Smidéliusz cetere - retkontakta kun la mondo - kunorganizis la konferencon kaj ĉeforganizis la laboron de nia sekcio. Kaj estis ŝia katedrestro kiu ĉefis la tutan kongres-organizadon. En intervjuo de la departementa gazeto li menciis E-on kaj interlingvistikan sekcion kun kvazaŭa pardonpeto: "tio... ne signifas, ke E-o havas ŝancon kiel Eŭropa lingvo aŭ mondlingvo, nur ke la sekcio allogis valorajn sciencistojn..." Nu, kion diri? Eble ni danku la gekolegojn venintajn aŭ sendintajn kontribuon. Kaj ni danku, eĉ pli emfaze, Katalinan Smidéliusz.

Parto de la kongresanaro estas fidelaj partoprenantoj de jaro al jaro, kun komunaj rememoroj kaj komuna respekto al la kvazaŭ-fondinto, al la matematike-kompute-multflanka lingvisto, rusisto, leksikologo, eminenta pedagogo, Ferenc *Papp*.
Pri Detlev Blanke, doktoro de la sciencoj, oni devas nepre diri, ke tra la somero en pluraj medioj li sukcesis diskonigi , interalie, la sciencan agadon de Wüster kaj la problemaron de terminologia laboro por E-o· En la Sombatheja konferenco li demonstris klare, ke – malgraŭ la fakto, ke Wüster (akceptante la planlingvon E-o kaj evoluigante ĝin deriveme) estis evidente skemismano se temas pri starpunkto pri planlingvoj - en sia ĝenerala, internacia terminologia laboro, kie ja temas pri vortoj, terminoj, uzotaj en aŭ ankaŭ en etnaj lingvoj, li uzis elementojn de la naturalisma maniero de vortadaptado (Eugen Wüster kaj la naturalisma skolo).
Zsuzsa Varga-Haszonits prelegis pri lingvistikaj konceptoj de István Szerdahelyi. Ŝi prave emfazis, ke li frue digestis kaj aplikis atingojn de pluraj modernaj lingvistikaj skoloj. Ŝi opiniis, ke Ferdinand Saussure kaj János Zsilka efikis je Szerdahelyi speciale. - La efiko de Saussure montriĝas plej evidente en lia prezento de la historio de lingvistiko. La efiko de *Zsilka* je Szerdahelyi – laŭ *mia* opinio – apenaŭ estas

rimarkebla, se oni ne konsideras speciale la instrulaboron kaj influon je la agado de la kursanaro - do la efiko karakterizas certe ne la *ĉefan lingvistikan* laboron de Szerdahelyi. Lian laboron Varga-Haszonits prezentis, cetere, konkreteme. Prave ŝi atentigis ankaŭ pri la lernilaro produktita de Szerdahelyi. Fine ŝi informis la aŭskultantaron pri faklaborajo de studentino pri la agado de István Szerdahelyi.
Ilona Koutny klare resumis la diskuto-punktojn en la E-a fonemsistemo kaj alofonaro, apogante sin ankaŭ sur sia sperto pri la parolsintezo. Ŝi iom tuŝis ankaŭ eblan manieron karakterizi vortradikojn. - Certe, diskutoj reokazados... Mi mem devas zorge legi ŝian tekston, postapere.
Péter Murányi evidentigis, ke la vorto *Esperanto* en la Hungara gazetaro estas multe pli ofta, ol ni – aŭ almenaŭ mi - supozis, sed ja – la plimulto de la uzoj estas uzoj metaforaj.
Otto Prytz klarigis kaj dokumentis, kiamaniere oni, apogante sin je vortosignifo kaj sintaksaj reguloj, konkludas, kvazaŭ *deduktas*, surbaze ankaŭ de la vivopraktiko kaj kultura fono, pri konkreta enteksta referenco de vorto, pri difinebla realajo. Lia temo estis tre interesa kaj ŝajnis tre proksima ankaŭ al la ĉefaj problemoj de la konferenco, tial ni venis al la interkonsento aperigi ĝin en la lingvo Hungara.
Estas tre valora kaj riĉa la materialo, alportita, kaj parte prezentita, de Árpád Rátkai pri la komencoj de la Hungaria planlingva movado. Temas pri laborajo plena je konkretaj indikoj. Li komencas prezenti la historion de la Hungaria lingvo-apliko de la 16-a jarcento, kiam Latino komencas malfortiĝi kaj en la bazgrada instruado aperas etnaj lingvoj. Sámuel Decsy en 1790 lanĉas la ideon hungarigi hungarianojn. Károly Sasku en 1938-39 opinias, ke la Hungara lingvo devus fariĝi internacia.
La historion de la ideo pri neŭtrala internacia lingvo Rátkai komencas de 1668, de la laboro de Comenius. Li prezentas indikojn pri György Bánfy, la unua Hungara volapukisto (1879). Rátkai verŝajnigas, ke li en 1911 estis (jam) kasisto de E-grupo en urbo Sopron. Rátkai kritikas, pridubigas plurajn indikojn de la Enciklopedio de Esperanto, ekzemple tiun pri fondo de la unua E-grupo en Hungario, onidire en 1901. Laŭ Rátkai la ĝusta dato estas la 1-a aŭ la 8-a de marto 1902-a - sabato. Mi ne daŭrigas, sed nur certigas pri la legindo de la eseo posttempete iel certe alirebla.
S-ro Rátkai en urbo Szombathely donis al ni kelkajn multobligitajn ekzemplerojn de versio Hungarlingva.
La metodologia laboro de Katalin Smidéliusz estas sekvebla por la legantoj de Internacia Pedagogia Revuo. Ŝi en la kongreso resumis la historion de la instru-eksperimentoj pri aŭ lige kun E-o, atentigis pri la bezono kompari la diversajn instru-eksperimentojn, kvalifiki ilin, kaj, ĉefe, koni la bazajn postulojn de fidinda eksperimento. Ŝi ilin prezentis al ni.
Mi (Blazio Vaha) en mia prelego provis demonstri, ke la sintaksa funkciado de la E-a difina artikolo estas simile grava, kiel ĝia difina rolo. Ĝi ofte indikas limon inter sintagmoj, jen faciligante, jen per si mem ebligante analizon kaj komprenon per

nekonscia analizo. Mi prezentis ankaŭ modalan kromefikon de la uzo de la prefikso *ek-*.
Pri Otto Prytz mi mem skribis por Hungaraj Paĝoj, ke li *tre sukcese komprenigis la mekanismon, kiel, laŭ malmultaj elementoj de lingva kodo, aŭskultanto rekreas por si adekvate la mesaĝon.* Tio, kion Otto Prytz klarigis, aliemfaze stampis ankaŭ la ĉefan temaron de la konferenco: rolo de la kultura fono ĉe lingvouzo, interkulturaj faktoroj de komunikado.
Giorgio Silfer ne estis veninta. Lian prelegon voĉlegis, dankinde, Monika Molnár. Silfer rekonfirmis, ke E-o estas – ankaŭ - identigilo, kaj aldonis informojn kaj interpreton pri la nova jura situacio de malgrandaj lingvoj. Mi konsilas al mi mem kaj al la legantoj de mia raporto, provi sekvi, kiel Silfer, de tempo al tempo, reagas al la prilingvaj difinoj meze de la Eŭropa kaj monda (sin)difin-febro. La temo, kiu cetere ĉeestas aŭ aperas en plej diversaj anguloj de Esperantujo, povas iun interesi aŭ ne interesi laŭ du aksoj: 1) Komparo al propraj difinemoj, 2) Konsidero de la kategori-reto, laŭ kiu oni kvalifikas ĉirkaŭ ni lingvojn kaj komunumojn por kompreni, kian trakton ni povas atendi deekstere.
En iu el la vesperoj, kiel dirite, ni rememoris kune pri la instruinto de pluraj kaj pristudito de ĉiu el ni - István Szerdahelyi. Ni eksciis, interalie, kiel li kuraĝigis Katalinan daŭrigi la laboron kun la gestudentoj.

Problemo de preskaŭ ĉiu el ni, ĉeestintoj, estas, ke nian laboron ne aŭ apenaŭ konas la specialista rondo, nia strikta medio; samtempe ni, en la esperantista rondo, ne ĉiufoje estas, laŭsubfake, specialistoj de la temoj de niaj kolegoj – reciproka pritakso ne ĉiufoje eblas kontentige. Pri tiu temo havis ideojn Detlev Blanke.
Kiuj ne ĉeestis, verŝajne ne scios pli multe ĝis aperos la konferenca volumo. - Jen la fino, venu vino.

Blazio Vaha

Tomislav Mitrović

Pri la novaj metodoj en Esperanto

La eldonadon de lernolibroj en la lingvo E-o tre ofte anoncas kaj akompanas granda reklamo "La plej bona metodo". Tia reklamo ne estas uzita tute bone. Kiom da metodoj estis ĝis nun? Multaj. Post "la plej" ne povas sekvi denove "la plej".
Nova lernolibro devas havi la celon: doni bonan instrueblecon en la lingvo al la estontaj veraj esperantistoj.
La altkvalito de la novaj metodoj estas diskutebla. Tiu aserto ne estas malica. Multe da aŭtoroj faras metodajn saltojn de instruado. La saltoj aperas de leciono al leciono,

ĉar la aŭtoroj facile forgesas la logikan vicon de la nocioj en E-o. Ili disĵetadas en lecionoj la substantivojn, la verbajn tempojn, la prepoziciojn, la afiksojn ktp. La instruantoj ne facile venkas la ĥaoson. Post kelka tempo la lernantoj forlasas la kurson de "la plej bona metodo." Ilia reago estas normala. Ili ne havas intereson. E-o ne plu funkcias konvinke.
Oni devas prezenti al la komencantoj la plej simplan metodon en la formo de sinsekvaj ekzemploj. Tio ne iras tre facile kaj rapide. La bona ordo estas beno por ĉiu afero. Por la ekzemploj oni devas uzi la vortojn de la objektoj kaj nocioj nin ĉirkaŭantaj, kiuj estas parto de nia vivo. La aŭtoro aŭ la instruisto devas scii la precizan sencon de la vorto kaj frazo. Uzi la vorton sen la analiza metodo estus pura maltrafo. Oni povas alpaŝi al la problemo diversmaniere.
Pro praktikaj kialoj mi nur simple prenos kelkajn ekzemplojn.
Tuj komenci de la literoj "a" ĝis "z". Sed estas esceptoj. Iuj klarigas nur la gingivalojn. La ceterajn literojn oni subkomprenas.
Fari malgrandajn vicojn de la vortoj: *tabulo – tablo, tempo – vetero, promeso – permeso, arbo – ligno, sana – sata, alta – granda, rakonti – renkonti, atendi – atenti* ktp. Oni vidas la vortojn kaj faras parojn. Ekzistas iom da ortografia aŭ senca simileco. [...]
Oni ne devas klarigi, kio estas substantivo, adjektivo kaj verbo. La tradukitaj vortoj klarigos la objekton aŭ la nocion. La patrino ja ne diris al ni "*La lakto estas substantivo*". Estus bone ĉe la substantivoj tuj uzi la artikolon "*la*".
Sekvas klarigo pri la vortradikoj kaj finaĵoj. Oni ne forgesu, ke ĉiu vorto troviĝas ĉiam en konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. La radikoj regule dispartiĝas en diversajn kategoriojn, t.e. verbajn, substantivajn, adjektivajn ktp. Oni asertas, ke "kategoria divido de radikoj tute ne ekzistas". Pro tio oni rajtas esti fleksema: kiel substantivigi, adjektivigi kaj verbigi. Post la vortoj *graso, grundo, hipnoto, drato* ktp. tamen malcertiĝos la komencantoj. La menciitaj vortoj en PV estas substantivoj, en PIV verboj. Oni povas substantivigi aŭ verbigi, sed kie estas la fundamenta vorto. La klarigoj mankas. La aŭtoroj estu singardaj!
Oni instruu la finaĵojn nur por la simplaj tempoj. La participoj estas malklaraj en multaj lingvoj. Ili restu por la lastaj lecionoj. La netransitivaj verboj estas pli bone utiligeblaj kiel ekzemploj. Oni havas la vortojn laŭ sia funkcio en la frazo. La simpla apliko de vortordo subjekto – verbo - objekto ne malhelpas.
Ne uzu la akuzativon! Ekzistas timo pro la akuzativo. La transitivajn verbojn kaj la akuzativon uzu nur post la prepozicioj. [*Precipe ĉe gelernantoj, kies gepatra lingvo ne indikas akuzativon. – Noto de la Korektanto.*] La komplikitaj gramatikaj reguloj interkonfuziĝas en niaj vortaroj PV kaj PIV. La verboj *devi, povi, rajti* ktp., en PIV estas transitivaj, en PV ne. Inverse: *drinki, enui, prediki, kosti, pozi, kaperi* en PV estas transitivaj, en PIV netransitivaj. Multe da verboj estas nedifinitaj en PV. Tiujn oni ne prezentu al komencantoj. Ĉe la verboj normale staru subjektoj, sed ne nur

personaj pronomoj. La kompleksajn tempojn oni prilaboru post la participoj.
La lasta finaĵo "e". Multaj aŭtoroj neglektas la primitivajn adverbojn. Oni havas la impreson, kvazaŭ la primitiva adverbo estus prepozicio. La enigmo simple solviĝas, kiam ni ordigas la prepoziciojn de "al" ĝis "trans".
La ceterajn vortspecojn ne estas malfacile klarigi.
La literoj "n" kaj "j" ne estas la finaĵoj de la vortradiko. La estontaj esperantistoj rimarkos la diferencon. Nun oni povas mediti detale pri la akuzativo.
La afiksoj senpacience atendas sian vicon. Unue la prefiksoj. Da finaĵoj estis jam sufiĉe.
Oni scias jam multe. Aldonu la kunmetitajn vortojn en la lecionoj.
Ĉu estas la fino? Dependas ... kie mi metas la limon por la komencantoj.
Oni devas havi bonan planon, kaj senti la vortajn eblecojn en la lingvo E-o. La scion akiru, sed ne faru mispaŝojn. Malbona metodo en la lernolibro estus utila al neniu, kaj malutila al multaj.

Tomislav Mitroviĉ
Bulevar Lenjina 16/13, YU-18000 Niŝ, Jugoslavio

REAGOJ AL...

Tomislav Mitroviĉ: "Pri la novaj metodoj..." en IPR 98/4

Tomislav Mitroviĉ liverus multe pli utilan kontribuon, se li klare indikus kiujn novajn metodojn kaj lernilojn li kritikas. Kelkaj reagoj:

1). Mi konas neniun lernolibron kiu reklamas sian metodon "la plej bonan". La situaci-komunika lernolibra serio de nia propra ligo certe neniam faris tian pretendon. Ni intence uzis la vorton "aliro" kaj ne "metodo". Ĝia aŭtoro klare entuziasmas pri komunika aliro kaj rekomendas al instruistoj provi elementojn el ĝi, sed konscias, ke ĝi al iuj instruistoj kaj lernantoj plaĉos kaj konvenos, al aliaj ne. La sola superlativa lernolibra fanfarono regule vidata estas tiu de UEA por *Saluton* de Audrey Childs-Mee. Sed ĝi ne pretendas, ke ĝia ***metodo*** estas la plej bona, sed la lerno-libro mem. Tio estas sufiĉe defendebla aserto, sed necesas kompletigi ĝin: "Simple la plej bona... sia-speca kaj sia-cela lernilo". Ĝi celas specife mem- kaj sol-studantojn.

2) [la aŭtoroj] "forgesas la logikan vicon de nocioj". Granda mito! Ne estas unu nura logika vico de la nocioj aŭ instruaĵoj en E-o. Plurdekoj da defendeblaj kaj bonaj vicigoj eblas, ĉiu kun sia propra logiko; la varieblo ĉe E-o superas tiun ĉe la naciaj lingvoj, kies labirintoj da esceptoj devigas pli rigidajn ordigojn. Jes, la materialo en

niaj kursoj estu zorge dozita en gradigitaj ŝtupoj, kaj ne kaprice dissemitaj kun superfluaj kaj nenecesaj malfacilaĵoj. Sed memoru, ke la baza celo de lingvo estas ebligi komunikadon. Ni ne limigu la nociojn ĝis tiu grado, ke ni ne povas komuniki utilajn ideojn.

3) "Ili disjetas en lecionoj la substantivojn, la verbajn tempojn, la prepoziciojn ... instruantoj ne facile venkas la ĥaoson." Kiom da senco-havaj frazoj oni povas konstrui, kiom oni povas komuniki, sen uzi substantivojn, verbojn kaj prepoziciojn? Tiujn elementojn ni simple bezonas, jam de la komenco! Bona lernolibro ilin prezentos klare, tiel ke ne rezultu ĥaoso.

4) Baza kritiko al Tomislav estas lia insisto je vortoj, eĉ la kontrastigo de konfuzeblaj vortoj, kio servos ĉefe por altigi la verŝajnon, ke la lernantoj ja miksu ilin! La baza unuo de lingvo kaj komunikado estas ne la vorto, sed la ***frazo***. Tio estu la komenc-punkto kaj kerno de nia instruado, kun la ĉefa atento al la verboj, kiel la motoroj de la frazoj.

5) La gramatika karaktero de radikoj bezonus tutan apartan artikolon!

6) Ne la participoj estas malklaraj, sed eventuale la kompleksaj tempoj (se ne taŭge prezentitaj). Konsentite, ke ilin lasu ĝis poste en la kurso, tamen ne la timata malfacileco estu la ĉefa motivo por tio, sed la komunika utilo. Oni povas sufiĉe taŭge esprimi multon en E-o sen ili — jen pli defendebla kialo prokrasti akiron de aktiva kapablo uzi ilin (tamen oni volus pli frue doni al lernantoj la kapablon kompreni ilin). Sed iuj participaj formoj en si mem estas tre facile instrueblaj, ili funkcias pure kiel adjektivoj, kaj ne nepre bezonas apartan analizon; ekz. la granda butiko, la utila butiko, la senutila butiko, la fermita butiko. La bela vazo, la multe-kosta vazo, la rompebla vazo, la rompita vazo. La vidbenda kurso *Pasporto al la Tuta Mondo* enkondukas nature en sia tria leciono kelkajn el tiuj pasivaj participoj, pli frue ol eĉ la akuzativo.
7) Ne uzu akuzativon!!?? Jen konsilo nepre ne nur ignorenda sed aktive kontraŭstarenda! La kvanto da ideoj komunikeblaj sen uzo de verboj transitive estas mizere malmultaj. Nur kalkulu la uzojn en la artikolo de Tomislav mem. Ne eblus ĝin verki senakuzative. Eĉ malmorale estus instrui tian kripligitan version de la lingvo kiu senigus la lernantojn je la plimulto de ĝia komunika potenco. Ĉu oni timas akuzativon? Timo lasata nur kreskas. Oni frontu la timon jam komence en la kurso, per klaraj, trafaj ekzemploj. Por lernantoj sen akuzativo en sia propra lingvo, des pli gravas tuj frue kaj emfaze prezenti ĝin. Ĝi estas integra kaj neellasebla parto de la lingvo, ju pli frue oni alproprigas ĝin, des pli bone. Plej bone tiom frue, ke la lernanto eĉ ne havis tempon suspekti, ke eblus veni al la ideo timi ĝin!
Memoru, la akuzativo estas verba demando, ne substantiva; ĝi dependas de la

kategorioj de la verboj, kiuj en E-o devas esti fiksitaj. La mankoj en PV kaj malkongruaĵoj kun PIV neniel pravigas subtapiŝigon de la uzo; lingva evoluo decidas kaj firmigas la kategoriigon de la verboj, la dubaj kazoj tiom maloftas, ke ili neniel povas kompromiti la prezentadon de la temo en lernolibroj. Seriozaj lerniloj indikas la kategorion de ĉiu verbo, kiun ĝi prezentas, ĉu per deklaro, ĉu per klaraj ekzemploj.

8) Gramatiko aŭ ekzemploj? "La patrino ja ne diras al ni *La lakto estas substantivo*." Prave.
Same prave, ke la lernantoj de E-o ne estas beboj. Moderna instruado tendencas ne eksplicite instrui la gramatikajn terminojn, sed prezenti trafajn ekzemplojn, bone ordigitajn. Do, iu gramatika sinsekvo kuŝas en la kursoj kaj lerniloj, sed ne estas nepre instruata. Prefere oni lernu (ene de strukturaj limoj) kiel sukcese komuniki en difinitaj situacioj. Tio akcepteblas, tamen multaj lernantoj (kaj instruistoj) sopiras je iom da sistemeca instruado aŭ almenaŭ resumo, des pli ke la E-a gramatiko estas tiom laŭregule kaj klare prezentebla! Mi hezitus tiom dogme aserti "oni ne devas klarigi, kio estas substantivo, adjektivo, verbo" kiu cetere ŝajnas rekte kontraŭdirita per "Uzi la vorton sen la analiza metodo estus pura maltrafo." Kio estas analiza metodo, se ne gramatiko?

9) "La tradukitaj vortoj klarigos la objekton aŭ nocion." Se mi bone komprenas, Tomislav sekve apogas tradukadon al la deven-lingvo de la lernanto, prefere al gramatika klarigo. Tio nur sklavigas la lernanton resti pensanta en sia deven-lingvo, sen kapti la spiriton kaj sencon de E-o. Prefere klarigi ion gramatike en simpla E-o, ol per traduko al la deven-lingvo! Pli prefere, per bildo, gesto, ago, kunteksto — io ajn ol nura traduko.

La artikolo de Wolfram Diestel (IPR 98/2, p. 27) proponis aŭskultan metodon de Birkenbihl, kaj levis interesajn ideojn. Ĝi efektive pledas por tut-fraza aliro, prefere al vorta kaj gramatika. Sendube, la regula aŭskultado de bonkvalitaj tekstoj en E-o forte helpas lernadon kaj spertiĝon. Ĝi kreskigas respekton por la komunika potenco kaj matureco de la lingvo, kutimigas lernanton al la muziko de ĝia sonado kaj iomgrade ebligas al lernanto alproprigi fraz-formojn, cele al propra produktiva uzo. Iuj homoj kun grandaj kapabloj sukcesos tiel akiri la lingvon. Tamen, tiu transigo por la plimulto estos signife pli efikigita, se la kernaj tekstoj estos tre zorge elektitaj/verkitaj, tiel ke ili ne jetu samtempe ĉiajn strukturojn kaj gramatikaĵojn. Plej sukcese estos, se ili prezentos la lingvon en serio da ŝtupoj, sen ke la lernanto vere konsciu pri tio, t.e. la tekstoj fluu bele, parolu pri interesaj temoj kaj traktu utilajn aŭ instigajn komunikajn situaciojn. Tamen ili provizu kapteblajn model-frazojn, kiun la aŭskultantoj ne nur papage parkerigu, sed (ankaŭ subkonscie) sorbu, tiel ke ili provizu la bazon por tuta serio de novaj kreitaj, adaptitaj frazoj, uzeblaj ankaŭ por solvi

similajn aŭ eĉ malsimilajn komunikajn bezonojn. Tiujn kernajn kaŝe-didaktikajn tekstojn oni suplementu per aliaj sen gramatikaj limoj, ĉe kiuj la tasko estus aŭskulti por kapti la ĝeneralan signifon, sen la nepra devo koni aŭ memori ĉiun vorton, nek tuj povi aktive regi ĉiun uzitan gramatikan strukturon.
Tiu parto de la proponaro plej tikla, estas denove la uzo de deven-lingvo kaj tradukado por komprenigi signifon. Tamen, se oni lernas sola, klare estas, ke oni devas iel kompreni la aŭskultatajn tekstojn. La ideo kripligi la deven-lingvon, ke ĝi paŭsu la cel-lingvon estas tamen interesa, ĝi kutimigas la lernanton al la regotaj strukturoj kaj principoj, kaj forigas la plej akrajn kritikojn pri katenado de la lernantoj al la lingva modelo de kiu oni devas eskapi.
Kaj tamen, tamen... kiom ajn utila kaj tempo-ŝpariga povas esti la aŭskulta metodo, nenio stimulas la aktivan komunik-kapablon pli ol viva, persona partopreno en paroliga kurso. Kombino de la du ŝajnus tre pozitiva solvo.

Stefan MacGill

Renato Corsetti: "Propede...kio?" en IPR 4/97

Via multflanka kaj profunda analizo de la lernofaciliga karaktero de E-o preterlasas la ĉefan punkton – lernfaciligo ne nur de...· kio, sed antaŭ ĉio – por... kiu? Propedeŭtiko signifas ne nur lernofaciligon, sed ankaŭ antaŭinstruadon, fruan instruadon, unuan instruadon. Kaj precipe nun, kiam en la unuiĝanta multlingva Eŭropo akre aperis neceso lernigi fremdajn lingvojn ekde pli frua lerneja aĝo, al infanoj; kiuj ankoraŭ ne sufiĉe konscias pri propra lingvo, oni devas adekvate elekti la unuan lernotan lingvon. Ĝi estu maksimume simpla kaj lernebla, klara kaj senescepta, kun minimuma kaj tre difinita gramatiko: Ĝuste tia estas E-o – luda funkcianta lingvomodelo kun etikeda finaĵa gramatiko, travidebla strukturo. Kaj ne tiom gravas ĝia facileco aŭ lernofaciligo pri alia lingvo, kiom la ĉefa rezulto – ebleco kiom eble plej frue kaj facile ekposedi lingvon alian ol la propra, ekimprovizi en ĝi, senĝene eknaĝi en la unua fremda lingvo. Temas pri psikologia rezulto, rompo de fremdlingva psikologia bariero. Tio estas la unua paŝo, farenda sur la senfina vojo tra la lingva ĝangalo, luda paŝo, konforma al aĝo kaj lerna motivo de infano. Ĉu ekzistas iu kultura lingvo, pli manipulebla fare de infanoj ol E-o, kaj poste aplikebla en plua lernado de eŭropaj lingvoj?
Mi konsentas kun s-ano Renato – eblas krei pli universalan algoritmon por tia lingvolerna gimnastiko, sed apenaŭ eŭropan interlingvon, kia ja estas E-o, kiu ja naskiĝis centre de Eŭropo... Ĉu s-ano Renato sincere kredas je ekzisto de Universala Gramatiko? Mi kredas, ke s-ano Renato ne dubas, ke E-o estas propedeŭtika por infanoj kiel la unua fremda lingvo, kun la perspektivo plulerni hindeŭropajn lingvojn.

Valdo Banajtis
26-35, Pergalės str., Vilnius LT-2041, Litovio

EL LA LANDOJ KAJ SEKCIOJ

Aŭstralio

15-a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

La kursaro okazos inter la 10-a kaj 23-a de januaro 1999 en la urbo Melburno ĉe International House (241 Royal Parade, Parkville, Victoria, 3052 Aŭstralio). Turnu vin al la kunordiganto – sekciestrino de ILEI en Aŭstralio – Jennifer Bishop: Telefono: 61 (0)3 9818 7358. Fakso: 61 (0)3 9905 3668. *E-poŝto*: *Esperanto@education.monash.edu.au*. *TTT: http://education.monash.edu.au/projects/Esperanto*

Ĉilio

Helpantoj serĉataj

Hector CAMPOS GREZ en majo '98 starigis retkurson de E-o en Ĉilio por hispanlingvanoj, bazita sur dek-leciona usona kurso. Li havas ĉirkaŭ 140 gelernantojn kaj la kunordigado jam fariĝas komplika Do li urĝe bezonas kunhelpantojn kaj instruantoj el Argentino, Brazilo, Meksikio kaj Hispanio por pritrakti la aliĝintojn el tiuj landoj. La retadreso de la aliĝilo estas:

<http://www.geocities.com/Yosemite/7266/curso_f.html>

la retadreso de la tekstoj de la kurso en kvar formatoj:

<http://www.geocities.com/Yosemite/7266/prononco.html>

La listo de lernantoj kaj iliaj retadresoj troveblas ĉe:

<http://www.geocities.com/Yosemite/7266/alumnos.html>

Hector Campos Grez, P.O.Box 231 CURICO, Ĉilio. Rete: strigo@ctcreuna.cl.

<www.geocities.com/yosemite/7266/index.html>

Ĉinio

Instruantoj serĉataj

Ni bezonas esperantistajn instruistojn pri la angla lingvo kaj denaskajn angleparolantojn. KIAL esperantistajn? Ĉar per ili eblas disvastigi la ideon de E-o. Ĝenerale oni opinias nur la anglan internacia lingvo kaj tial estus konvinke se angleparolanto rekomendus E-on. La serĉata persono ne devas esti profesia instruisto. Li/ŝi instruos en universitatoj, mezlernejoj kaj en diversaj kursoj. Kompreneble oni pagos laŭ la gradoj kaj kvalitoj. Ordinare la salajro de profesiulo estas RMB (ĉina valutunuo) 1500-2000 al kiu sumo aldoniĝas senpaga loĝejo. La sumo, kvankam egalas nur al iom pli ol 200 usonaj dolaroj, duoblas ol tiu por ĉino kaj sufiĉas por vivteni tri personojn en Ĉinio.

Peng Zhengming, 301-3-2, Meiyuan Xiaoqu, Wuchang,Wuhan, 430070,Ĉinio

Hispanio

Fakultato de Filologio de la Universitato de La Laguna (Tenerife, Kanariaj Insuloj) ofertas la kurson "Introducción al Esperanto y su cultura" -Enkonduko al E-o kaj ties kulturo. La instrudado de E-o revenas al tiu ĉi universitato post 17 jaroj - Régulo Pérez instruis E-on en oficiala universitata kurso ekde 1963 ĝis 1981.

Kurso en Kanariaj Insuloj

ESTO, E-o societo de Tenerifo (Kanariaj Insuloj, Hispanio), sukcesis prepari kurson por instrui E-on en la Universitato de La Laguna. Fakte, de kiam Juan Regulo ĉesis agadi oni ne plu havis aliron al tiu grava institucio. La klasoj okazos en la lingva laboratorio de la fakultato pri lingvoj. Same kiel en la Universitato de Valencio, la lernantoj ricevos 3 kreditojn, fakto tre grava ĉar tiuj poentoj validas por akiro de la koncerna universitata diplomo. La kurso komenciĝos en Universitato de La Laguna en marto de 1999. sub la gvido de profesoro Alejandro Lopez de Vergara. Por pliaj detaloj bv. sin turni al fjdavila@arrakis.es

Miguel Gutierrez

Hungario

Kursoj en Debrecen kaj Nyíregyháza

Dum la lastaj du semestroj en KLTE (Scienca Universitato "Lajos Kossuth" en Debrecen 72 gestudentoj sukcese trapasis baznivelan E-ekzamenon, t.n. studfinan, en du grupoj, kies gvidanto estis Tibor PAPP. Ekzamenis: d-ro József SZABÓ kaj Tibor PAPP.

Meze de junio 1998 komenciĝis E-kurso antaŭprepara por meznivela E-ŝtat-ekzameno en la urbo Nyíregyháza. Enskribiĝis 76 gekursanoj en du grupoj por E-kurso duobla (baza, poste meza), organizita de TIT (Societo pri Scienca Popularigo): ili ĉiuj ekbezonis E-scion por povi ricevi diplomon en sia fako. La kursestro estas Tibor PAPP.

Tibor PAPP <db@satrax.hu>

Interlingvistikaj studoj en Szombathely

En la nova universitatranga katedro pri Aplikata Lingvistiko en la Pedagogia altlernejo de Szombathely (Hungario) en la unuajaran studprogramon eniris ankaŭ interlingvistiko. La studentoj estas filologoj, kiuj krom la fako aplikata lingvistiko specialiĝos ankaŭ pri la angla aŭ la germana lingvoj. Krom la ĝeneralaj lingvistikaj studoj ili konatiĝos ankaŭ pri interlingvistiko, pri kiu dum du semestroj po 2 horoj okazas lekcio kaj seminario. La studprogramon konsistigas lingvopolitikaj demandoj, analizo de aprioraj kaj aposterioraj lingvoprojektoj, dum la dua semestro detala analizo de Volapuko, E-o, Ido kaj kelkaj aliaj artefaritaj lingvoj.

Pozicio de la stud-objekto

Ne estis tute nature akceptigi, ke la objekto eniru la ĝeneralan instruplanon, kaj komence estis tiel, ke ĝi estos nur elektebla studobjekto. En la momento de la starto la pozicio de interlingvistiko firmiĝis, ĝi fariĝis baza studo, deviga por ĉiu studento, kaj libere elektebla por tiuj, kiuj studas en la alia universitatranga fako finno-ugra lingvistiko. Fakte nun en la pedagogia altlernejo interlingvistikon rajtas studi nur tiuj, kies unu fako estas universitatranga, sekve tio donas grandan prestiĝon al la studoj pri interlingvistiko.

Menciindas, ke krom tiuj studentoj ĉi-semestre denove varbiĝis 30 studentoj (ĉefe ne filologoj) kiuj eklernis E-on (por facile kaj rapide trapasi la necesan lingvoekzamenon). Tiuj studentoj devas pagi sufiĉe altan sumon por la semajne 4 studhoroj, sed faras tion volonte, ja dum la antaŭaj jaroj altprocente oni sukcese ekzameniĝis pri tiu ĉi "simpla lingvo". El inter ili nur malmultaj infektiĝas vere de la ideologio de la lingvo, sed certe konsentas pri tio, ke E-o estas la plej bona solvo por (iliaj) lingvo(politikaj)-problemoj.

La unuaj spertoj

Je mia granda surprizo inter la 30 filologo-studentoj troviĝis du kiuj parolas E-on (unu devas revivigi siajn konojn, sed la alia tre bone parolas ĝin). Dum la paŭzoj kun ili mi komunikas en nia komuna lingvo, kio ekinteresigis la aliajn studentojn. En la tria semajno post la pritrakto de lingvopolitikaj demandoj (historiaj kaj nuntempaj) la studentoj ekhavis la taskon en 5-membraj grupoj komenci ellabori propran lingvoprojekton, kiu devas esti simpla kaj facile lernebla por la anoj de la Eŭropa Unio. Dum ilia memstara laboro mi povis observi iliajn ĝeneralajn konojn (aŭ ties mankojn) pri lingvistiko, vidis kion ili opinias gravaj por karakterizi lingvon. Post la seminaria laboro ili ne volis malkaŝi sian projekton al la aliaj grupoj, sed petis plusajn semajnojn por detale prilabori la projektojn. Mi kun granda ĝojo konsentis pri la peto. Estis tamen interese rimarki kiomgrade ili ne povas liberiĝi de siaj studataj lingvoj; ekzemple la germanistoj proponas majuskle skribi la substantivojn.

Kvankam mia celo estis nur tio, ke ili alfrontu la malfacilaĵojn prilabori lingvoprojekton por ke dum la postaj analizoj la studentoj de pli proksime kaj pli interesataj travivu la diversajn solvojn de la unuopaj lingvoprojektoj. En la granda konkurenco mi esperis printempe venkigi E-on kaj nun kun intereso mi atendas la finan rezulton.

Malfacilaĵoj

Mia propra biblioteko pri la temo estas ĉefe esperantlingva, nur verkoj de prof. Szerdahelyi kaj novaperinta libro de U. Eco pri la serĉado de la perfekta lingvo staras je nia dispono en la hungara lingvo. Altigus multe la prestiĝon de la fako, se

kelkajn librojn pri la temo mi povus enmanigi al la studentoj ankaŭ en la angla aŭ en la germana lingvoj. Krome estus tre bone posedi priskribojn de kelkaj lingvoprojektoj por la postaj studoj. Mi petas la samideanojn, kiuj povas kontribui al tiu ĉi laboro, bv. sendi al ni materialojn al la suba adreso:

dr. Katalin Smidéliusz, BDTF Alkalmazott Nyelvészeti Tanszék, 9701 Szombathely, Pf. 170. Hungario

Italio

KIREK, la Itala retkurso

La Itala Esperantista Junularo pretigis senpagan retkurson de E-o alirebla de sia TTT-ejo, nome KIREK (KomputIl-Reta E-Kurso). La itala teksto de la kurso baziĝas sur la anglalingva kurso de ELNA. Por sekvi ĝin sufiĉas havi retadreson.

Bonvenas ankaŭ ne-italoj, ja tiel la etoso de la dissendlisto certe plialtiĝos. Por kontribui kontaktu Federico Gobbo <federico.gobbo@newlog.it> vle Petrarca 12 IT-20052 Monza MI Italia, telefono: 39.39.326522, fakso: 39.39.2302832

Japanio

Maja Festo, kun alloga temo: Interreto

Ĝin organizis Rondo Harmonia, kies membroj estas iamaj kaj jama studentoj de universitatoj tutlande. Al la ĉi-jara Maja Festo kun titolo "E-Kurso en Interreta Tempo" aliĝis 63 partoprenantoj kaj 10 gvidantoj gvidis diversajn kursojn. Dum la tuta kunloĝado estis kurso pri interreto kaj faro de hejmpaĝo por komencantoj, kaj fine ĉiuj sukcese konstruis propran TTT! Speciala karaktero de la kunloĝado estis tio ke la lernantoj povis daŭre ŝanĝi sian kurson kaj iri al dezirata alia.

laŭ Reza Kheirkhah

Jugoslavio

E-o por vidhandikapitaj infanoj

La franca blinda esperantisto Edgar Gullbeau diris: "Eĉ se E-o ne estus ekzistanta, ĝi devus esti kreita nur pro ni blinduloj!" Kaj la franca profesoro Theophile Cart donis al la Brajla alfabeto la sesan punkton por presigi la E-literojn. Per tiuj informoj komencis Vlado Stefanoviĉ, la blinda jugoslavia esperantisto, sian prelegon pri helpo de E-o al blindaj esperantistoj faritan en la internacia konferenco pri lerneja instruado de E-o, okazinta en Beograd antaŭ 35 jaroj. Tiam li instruis E-on en la Instituto por Vidhandikapitaj Infanoj en Zemun (Beograd) kiel devigan studobjekton. Baldaŭ ĝi fariĝis nur fakultativa, kaj hodiaŭ E-o tie estas instruata en la formo de libera aktiveco. Post la emeritiĝo de Vlado Stefanoviĉ, antaŭ pli ol tridek jaroj, la instruadon transprenis Etelka Kiŝ, tiama sociallaboristino en la Instituto. Nun mem emeritino, ŝi plu vizitadas la Instituton por gvidi du E-grupojn, la komencantan (13 gelernantoj) kaj la pli aĝan (7 gelernantoj).

El la E-lernejo en la zemuna Instituto eliris pluraj elstaraj esperantistoj, kies

aktiveco estas rimarkinda en la organizajoj de vidhandikapitoj en Jugoslavio. Grandan parton de la breta spaco en la bibliotekoj de tiuj organizajoj okupas E-libroj brajlaj kaj sonaj. En la Instituto ekzistas intereso pri la projekto "Interkulturo" (E-Linguapax). Ili volonte partoprenos se en aliaj landoj troviĝos lernejoj por vidhandikapitoj kun E-grupo. Sed ĝi ne estos la unua internacia kunlaboro de la junaj zemunaj vidhandikapitaj esperantistoj.

La deksesjara Branka Peŝiĉ, duoble handikapita ĉar en bombakcidento ŝi perdis la vidkapablon kaj ambaŭ manojn, pasintjare partoprenis en la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Kiev. Danke al konatiĝo kun la karmemora Nora Moerbeek kaj ŝiaj klopodoj, pri Branka eksciis s-ro Jacques Tuinder, nederlanda esperantisto, fondinto kaj gvidanto de la Fonduso "Evidente", kiu jam 32 jarojn helpas al vidhandikapitoj kaj iliaj institucioj en pluraj landoj. Post interkonsiliĝo kun specialistoj el la Nederlanda Rekapabliga Instituto Heliomare, oni decidis donaci al Branka "parolantan" komputilon, speciale ekipitan (skanilo, parolilo, programaro) por ke ŝi povu manipuli ĝin por memstara legado, lernado, verkado, komunikado. Ŝi ricevis ĝin en aprilo 1998 kaj jam scipovas tajpi per la restaĵoj de la brakoj. Nun ŝi lernas plu por plene ekregi la komputilon kaj kiom eble plej sendependiĝi en ĝia uzado.

En julio 1998 Branka partoprenis en la Somera E-Lernejo en Tesliĉ. Tio estis ŝia unua sperto kaj, laŭ ŝia deklaro, tre agrabla sperto de lernado en grupo de vidkapablaj samaĝuloj. Ŝia ekzemplo pruvas, kiom pravis Edgar Gullbeau.

Radojica Petrovič, <radp@emi.yu>

Pollando

Deviga studobjekto en Krakovo

Antaŭ la someraj ferioj ĉ. 30 studentoj ekzameniĝis post 1-a grada oficiala kurso de E-o en la Universitato Jagelliona en Krakovo, gvidita de Maria Majerczak.

La studprogramo de multaj aliaj studentoj ne postulis ekzamenon: por enigi E-on inter iliajn devigajn studobjektojn kaj ricevi oficialajn poentojn sufiĉis por ili konfirmo en la studlibreto kaj ekzamenfolio pri 1-2 semestra lernado de E-o, kunaŭ sen pritakso (la postuloj varias laŭ fakoj).

Kaj la ekzameniĝintoj kaj la neekzameniĝintoj estis elektintaj E-on kiel devigan studobjekton, egalrajtan kun aliaj instruataj sciencbranĉoj kaj lingvoj en la Universitato.

Pola Sekcio de ILEI

Interlingvistikaj Studoj sukcese startis en Poznan

Inter la 24-28-a de aŭgusto okazis la unua sesio de postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en

Poznan. [...]

Dek gestudentoj (el Germanio, Nederlando, Belgio, Makedonio kaj Pollando), post sia orientiga testo, aktive partoprenis la intensajn kursojn pri - ĝenerala kaj E-a fonetiko gvidata fare de prof. John Wells, kiu tre interese kaj praktike prezentis diversajn eblecojn de prononcado kaj klarigis fonetikajn procedojn en diversaj lingvoj; - teorio kaj praktiko de komunikado fare de d-ino Ilona Koutny, kiu traktis komunikadon ekde la informteoria tra la besta ĝis la homa formoj provizante multajn ekzemplojn el diversaj kulturoj, koncentrante sin al la internacia kaj interkultura komunikado en ties lingvaj kaj nelingvaj aperoj; - enkonduko en E-an kulturon fare de d-ro Zbigniew Galor, kiu post la difino de tereno kaj rolo de kulturo donis trarigardon de e-a kulturo en diversaj kampoj (scienco, edukado, artoj, ĉiutaga vivo), analizis la kulturon de Esperantio kaj de esperantistoj; - la unua periodo de e-a literaturo kun mag. Lidia Ligeza, kiu post la kurso prezentis ankaŭ siajn tradukojn kaj poemojn.

La sekva sesio de la 3-jaraj eksteraj studoj okazos en februaro. La universitato ofertos eblecon aliĝi al la Studoj ankaŭ en la sekva studjaro.

Por informoj turnu vin al: *d-ino Ilona Koutny Lingvistika Instituto, Adam Mickiewicz Universitato Miedzychodzka 5, PL-60-371 Poznan. T/F (sekr-ejo): +48-(0)61 861-85-72. T/F (hejme): +48-(0)61 817-28-73 (fakso nur post antaŭa anonco). Rete: ikoutny@amu.edu.pl*

Rusio

En la For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato funkcias la E-klubo "Pacifiko", en kiu membras kaj studentoj kaj instruistoj de diversaj fakultatoj.

La Klubo serĉas kunlaborajn kaj spertinterŝanĝajn kontaktojn al multaj aliaj universitate funkciantaj E-grupoj kaj kluboj.

Leteroj estas atendataj ĉe *For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, FOŜTU 10, ul. Puŝkinskaja, RU-690600 Vladivostok, Rusio,* rete: esper@pub.marine.su

Svedio

Jam tradicia dutaga seminario de la Sveda E-instituto okazis en Lesjöfors la 26-27-an de septembro 1998. Unu el la programeroj rilatis al la kampo de lingvoinstruado, nome prelego de d-ino Katalin Smidéliusz pri "Andreo Cseh kaj la lingvoinstruado tiam kaj nuntempe".

Katalin Smidéliusz ja estas kaj profesia lingvopedagogo (inkluzive laŭdata Cseh-instruisto), kaj konanto de la vivo de Andreo Cseh. (Atesto pri la lastenomita estas ŝia *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh.*) Do, ŝi komplete majstras sian prelegtemon, kiun ŝi disvolvis ekde la infanaĝo de Cseh, al lia pastriĝo, forlaso de la pastreco kaj

plenokupo per unika E-instruado, sekvata de parte amaraj vivojaroj, kies fino tamen ne signifis finon de liaj instruideoj.
Katalin Smidéliusz inkluzivas en sia elokventa parolarto econ, kiun ĉiu preleganto dezirus posedi: ŝi sukcesas igi la aŭskultantojn senti kvazaŭ ŝi parolus ne al ili, sed kun ili, kaj tial ŝi havas eksterordinaran kapablon kapti la atenton. Tio konfirmiĝis ankaŭ la postan tagon, kiam ŝi prezentis tute alian temon: "Hungara muziko kaj hungaraj muzikistoj".
Docento Ebbe Vilborg jam de longe finfaris la kvinan volumon de *Etimologia Vortaro de Esperanto,* kies publikigon ni ankoraŭ atendas. Unu el la eroj de ĝi li prezentis en erudicia prelego: "Zamenhof - ĉu kreanto aŭ imitanto. Pri la etimologio de la gramatikaj elementoj de E-o." La eblaj fontoj de Zamenhof kaj la evoluo de kelkaj gramatikaj elementoj inter la diversaj versioj de praesperanto estis lerte pritraktataj. Krome, la programo enhavis primovadajn kaj informajn prelegojn de d-ro Vjaceslav Hromov, Bertil Andreasson, Märtha Andréasson kaj Lars Forsman, kaj amuziĝo helpe de la gurdisto Roland von Malmborg.

Bo Sandelin

Turkio

E-kurso komenciĝis en la urbo IZMIR

La unuan de oktobro 1998 malfermiĝis en la novega "Centro de la Junuleco Ataturk'" la unua E-kurso de la turka urbo IZMIR. 22 gelernantoj ĉeestis, gvidataj de itala samideano PEGAZZANI Florian, kaj ĉiuj estis ege kontentaj pro granda sukceso. Oni povas sendi gratulojn, kuraĝigojn kaj subtenojn al <baha95pegaso@superonline.com>

COFFINET Eric Bernard (el NUN)

Usono

29-a somera kursaro en San Francisco

Instruistoj: Katalin Smidéliusz (Hungario), John Wells (Britio), Aleksandro Shlafer (Rusio/Usono, ĉefinstruisto). Kanae Hirose (Japanio) estis respondeca pri eksterkursa instruado.
La kvanto de kursanoj estis ĉ. 60 (verŝajne rekorda nombro!). Tiu ĉi estis jam la 29-a (!) jaro de oficiala Somera E-kursaro en SFSU (San Francisco State University = Ŝtata Universitato de San Francisco) – la motoro de la programo de la komenco estis kaj restas nia kara Cathy Schulze, honora membro de UEA kaj tre ĉarma homo. Ĉi-jare la unuan fojon neniu el la instruistoj estis "vera" usonano (mi ja vivas en Usono, sed nur kelkajn jarojn), kio certe aldonis eĉ plian internaciecon al la tuta aranĝo. Post la fino de la kursaro mi ricevis multajn reeĥojn, tre favorajn kaj dankajn pri la organizado kaj pri la instru-nivelo.
Ne temis pri nura instruado. Preskaŭ ĉiutage estis organizitaj aldonaj aranĝoj: kunvenoj de literatur-amantoj, internaciaj (UEA/ILEI) kaj usonaj E-ekzamenoj,

prelegoj, informaj, muzikaj kaj distraj vesperoj, konversacia rondo por komencantoj ktp. Konklude: bonvenon al la venontjara, 30-a, jubilea, kursaro en San Francisco!

D-ro Aleksandro Shlafer

Uzbekistano

Alvoko al ĉiuj esperantistoj

Eŭgeno Perevertajlo [*adreso sur la 3-a kovrilpaĝo*], kun kiu mi konatiĝis dum mia vojaĝo en Centra Azio en 1982, instruas E-on al geknaboj de 9 ĝis 16 jaroj. Li proponas al ni, esperantistoj, trovi samaĝajn geknabojn, kiuj skribos nacilingve mesaĝojn al tiuj junaj uzbekistanoj. Iu el vi tradukos al E-o la leterojn, kaj kiam venos la respondoj en E-o, denove la samaj povos nacilingvigi ilin. Iom post iom niaj geknaboj, konstatante, ke ili mem povas diveni la skribitajn vortojn, estos scivolemaj koni profunde E-on. Ŝajnas tiu metodo estas bona por instigi la infanojn, ke ili interesiĝu pri nia lingvo. Mi esperas, ke la legantoj de tiu ĉi alvoko favore reagos.
[Pri la funkciado de tia sistemo vi legos artikolon de s-ino Noireau en IPR 99/1– NdlR]

G. Blary el Arles (Francio)



Nun ankaŭ ni, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, havas "ejon" en la komputila Interreto, kaj pli precize en *TTT* (Tut-Tera Teksaĵo, angle *WWW*), kie ni povas legi kaj meti informojn pri nia asocio, kaj pri ĝiaj lokaj filioj.
La adreso de la menciata *TTT-ejo* estas la jena:
La paĝaro estas ankoraŭ kompletigata kaj modest-aspekta. Tamen jam nun ĝi celas:
- unue liveri al niaj anoj kaj ĝenerale al E-instruantoj utilajn kaj freŝajn informojn por pli bone labori;
- due disponigi novan komunik-ilon, per kiu niaj komisionoj kaj landaj sekcioj povas konigi siajn agadojn kaj produktojn;
- trie, ĉar Interreto estas publika medio, nia paĝaro povas ankaŭ roli kiel vitrino por aliaj lingvo-instruistoj, eduk-politikistoj, kaj ali-specaj interesatoj.

Interalie enestas (aŭ enestos) jenaj paĝoj:
+ **estraro** kaj **laborkomisionoj** (kie aperos celoj, membroj, estroj kaj adresoj);
+ landaj **sekcioj** kaj reprezen-tantoj, kun ligoj al eventualaj TTT-paĝoj de landaj sekcioj (se iuj sekcioj petos kaj se estos sufiĉa spaco, oni povus gastigi eĉ novajn landajn paĝetojn);
+ **E-lernejoj** (t.e. laŭlandaj kaj laŭkategoriaj tabeloj, kie kolektiĝas adresoj de lernejoj, kie E-o estas instruata, uzata aŭ ĉeestas io pri E-o, eĉ se nur E-parolanta instruisto);

+ lernejaj **projektoj** (kie aperos informoj pri lernejaj eduk-projektoj aŭ instrueksperimentoj, kiaj *Interkulturo, Ekparoli, ESP², Mondo-rondo, KKST, Fundapax,* ktp.)
+ porinstruistaj **aranĝoj** kaj iniciatoj, kiaj ILEI-konferencoj kaj trejnaj seminarioj;
+ **lerniloj**: informoj pri lerno-libroj kaj aliaj instruhelpiloj utilaj por E-instruado;
+ lingvaj **ekzamenoj** kaj **konkursoj**;
+ informoj kaj materialoj pri niaj **komunikiloj** paperaj kaj retaj (*IPR*, Juna Amiko, ILEI-rubriko en Eventoj, ILEI-Bulteno ĉe "esperanto.nu", ktp.).

Krome referencaro (hiperligoj) al ĉiaj aliaj TTT-paĝaroj kiuj povas interesi ILEI-anojn, ekde E-bibliotekoj kaj teksto-bankoj ĝis neesperantaj informoj pri lingvo-instruado.

Per ĉi tiu artikoleto ni volas ne nur anonci al vi la aferon, por ke vi **utiligu** ĝin kiel konsultantoj, sed ankaŭ varme alvoki vin **kontroli** la datumojn pri via regiono kaj agado, kaj se oportune sendi al ni aktualigojn, kompletigojn, kaj sugestojn!

Maŭro La Torre

KOREKTO: En la listo de landoj ĉeestantaj en la 32-a ILEI-Konferenco ĉi-jare okazinta en Motpellier forfalis mencio al Israelo en IPR 98/3. Pardonpetas pro tio: Atilio ORELLANA ROJAS, sekretario

LERNEJAJ INTERŜANĜOJ

La Eŭropa Unio subvencias interŝanĝojn inter lernejoj (precipe mezaj, sed ankaŭ bazaj kaj altlernejoj) el EU-landoj. Sub certaj kondiĉoj ankaŭ lernejoj de ne-EU-landoj rajtas partopreni. Ĉe tiaj interŝanĝoj estas multaj obstakloj, i.a. lingvaj. Tial ofte lernejestroj preferas interŝanĝon kun samlingva aŭ anglalingva regiono. Sperto pruvis ke ekzemple portugalaj aŭ italaj lernantoj unuflanke, kaj nordeŭropaj lernantoj aliflanke, malfacile komprenas unu la alian. Tio same validas por la instruistoj kaj la gastigantaj familioj. Jen problemo kiun E-o povus solvi. Laŭ mia scio ĝis nun estis neniu tia interŝanĝo en kiu E-o havis rolon. Lernejoj kiuj emas uzi E-on en interŝanĝprojekto sciu ke ekzistas interreta datumbazo kiu akceptas petojn kaj ofertoj. Verŝajne tra ĝi eblas trovi E-partneron. Konsultu <*http://partbase.eupro.se*>. Ĝis nun konsultado eblas nur per angla lingvo; franca kaj germana estas preparata. Minimume Netscape 3 estas bezonata.

Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge

33-A ILEI-KONFERENCO

7-13-a de aŭgusto 1999 - Karlovy Vary, Ĉeĥio

Pri la Konferenca urbo, Karlovy Vary (Karlsbad, Carlsbad)

Konata ĉeĥa banloko, 57 000 loĝantoj. La urbo situas en bela valo ĉe la riveroj Teplá kaj Ohre. En ĝia ĉirkaŭaĵo estas multaj parkoj kaj arbaroj kun pli ol 100 km da promenvojoj. La plej alloga estas la centra banloka urboparto, kiu estas apartigita de la administra, industria kaj loĝkvartaloj.

Multaj hoteloj kaj kuracdomoj proponas pli ol 5mil litojn. La pacientoj el la tuta mondo serĉas ĉi tie perditan sanon. Kune kun modernaj balneologiaj procedoj kaj bankuracado estas uzataj ankaŭ la plej malnovaj kuracmetodoj, inter alie trinkado de la akvo (12 fontoj) kaj banado en la termala akvo. Kun plena sukceso estas ĉi tie kuracataj malsanoj de stomako, stomakaj kaj duodenaj ulceroj, malsanoj de hepato, malsanoj de urinaj vojoj, diabeto, grasdikeco, podagro, alergioj kaj ekzemoj.

La banejurbo estas elstara kultura kaj socia centro fama ankaŭ pro internaciaj filmfestivaloj. La plej konataj produktoj de Karlovy Vary estas bongustaĵoj: likvoro Becherovka ofte nomata "la 13-a kuracfonto de Karlovy Vary, specialaj bongustaj, sed ankaŭ bonege digesteblaj vafloj kaj minerala akvo Mattoni, sed ankaŭ la konata bohemia kristalvitraĵo kaj la plej fajna porcelano.

Kongresejo: Ni kongresos en studenta hejmo [*vd. la lastan paĝon*], bone atingebla de administra urbo per urba buso, en pieddistanco de la banloka centro. La kongresejo situas en trankvila parto de la urbo, kie ne ĝenas industrio, nek densa trafiko. Ĝi estas moderna konstruaĵo kun du kategorioj de loĝado: A – hotelĉambroj (duŝejo kaj necesejo en ĉiu ĉambro) kaj B – studentaj ĉambroj kun lavpelo (varma kaj malvarma akvo), sed duŝejo kaj necesejo trans la koridoro.

Manĝebloj: En teretaĝo de la kongresejo troviĝas agrabla studenta manĝejo. Surkoridore servas aŭtomat-trinka maŝinoj, kontraŭ moneroj oni povas ricevi varmajn kaj malvarmajn senalkoholajn trinkaĵojn. Proksime de la studenta hejmo estas aĉetcentro kun du nutraĵ-vendejoj kaj simpla tre favorpreza restoracio. Proksima banloka centro proponas diverstipajn restoraciojn kaj kafejojn, kie eblas gustumi la lokajn specialaĵojn kaj ĝui la banlokan etoson.

Tuttaga ekskurso: *Marianske Lazne*

La dua plej granda banurbo en Ĉeĥio, uzas por kuracado 39 termalajn fontojn, gasan karbonan dioksidon kaj torfeojn. Ĝi troviĝas en belega naturo, dominanton kreas angla parko, ĉirkaŭ kiu estas konstruitaj unuopaj kuracdomoj. Al la mondkonataj allogaĵoj apartenas "Kantanta fontano".

Venas ĉi tien pacientoj kun malsanoj de renoj kaj urinaj vojoj, malsanoj de angioj kaj spirvojoj, grasdikeco, podagro, vertebrogena dolora sindrono.



Kastelo Loket

Pitoreskaj mezepokaj urbo kaj samnoma kastelo kun interesa ekspozicio de fantomoj. La kastelo estis ofta celo de la germana poeto J. W. Goethe, kiu ĉi tie malfeliĉe enamiĝis estante jam 70-jara viro en tre junan knabinon, kiu rifuzis lian admiron. En la kastelo estas ekspozicio de ĉeĥaj fantomoj kaj en la keloj estas ekspozicioj de iamaj malliberejoj.

Duontaga promeno: Karlovy Vary - banloka centro

Dum la promeno tra la banloka centro ni povas gustumi de 12 fontoj varman sanigan akvon. Nian promenon ni komencos ĉe la plej malnova preĝejo Sankta Andreo de la 15-a jarcento, kiu nun funkcias kiel biblioteko. Griza granda konstruaĵo de la hotelo Thermal, krom pacientoj gastigas ankaŭ ĉiujare partoprenantojn de konata filmfestivalo. Dum la tuta jaro servas al gastoj ĝia subĉiela 50 metra baseno kun termala akvo. Parko de A. Dvorak kun lia statuo kaj "Parka kolonejo" agrabligas la promenon inter du famaj konstruaĵoj Lazne V kaj Armea banloka sanatorio. Ĉirkaŭ la sekvanta kuracdomo Lazne III ni eniros la plej allogan promenvojon al Mueleja kolonejo [*vidu la supran foton de Petro Chrdle - NdlR*], kie vi trovos la fontojn: Rokan, Muelejan, Libuŝe, Princo Venceslao kaj Najado. Vi povas admiri la fasadojn de renovigitaj sanatorioj kaj ni alproksimiĝas al kurioza ligna Foireja kolonejo. Super ĝi restis el mezepoka burgo nur Kastela Turo. De ĝi ni iom flankeniros por viziti la monumentan rusan ortodoksan preĝejon de sanktaj Petro kaj Paŭlo. La plej fama de ĉiuj 12 mineralaj fontoj estas Gejziro, kiu ŝprucas el profundeco 2 mil metroj en altecon 14 metroj kaj vi povas admiri ĝian forton en moderna vitra halo. Fine de nia promeno ni uzos funikularon por atingi la observejon Diana, de kiu vi povos vidi preskaŭ la tutan urbon.

Petro Chrdle

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Esperanto – internacia lingvo

33ª ILEI-Konferenco
7ª-13ª aŭgusto 1999
Karlovy Vary – Ĉeĥio
Temo:
Edukado al la Paco
Konferenca numero:

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon. Bv tajpi aŭ skribi preslitere.

FAMILIA NOMO ..... VIRO/VIRINO
(por alfabeta ordigo) (forstreku unu)
PERSONA(J) NOMO(J) .....
ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo) .....
.....
LANDO.....TEL Nº (kun prefikso) .....
PROFESIO/FAKO .....

Mi aliĝas al la Konferenco laŭ la kondiĉoj presitaj sur la sekvaj paĝoj kaj pagas al la ILEI-Kasisto:
Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn de ĉi tiu aliĝilo.

DATO..... SUBSKRIBO.....

KOTIZO (vd. sekvan paĝon)	.....
LOĜADO	.....
EKSKURSOJ	.....
KASO DAZZINI	.....
KOLEGHELPA KASO	.....
FONDAĴO SZERDAHELYI	.....
FONDAĴO E. LINS	.....
BANKKOSTOJ	.....
ENTUTE (en guldenoj)	_____

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon? *jes/mi kunsendas* (forstreku unu)

La kotizoj varias dependе de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B

B: iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la ILEI-Kasisto laŭ jenaj vojoj:

a) al ILEI-konto ĉe UEA: ilek-a, indikante: „ILEI-Konferenco";

b) al poŝtĝirkonto Nº 68 21 17-7, ILEI, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio. Bv aldoni NLG 10,00 por bankaj kostoj;

c) per via banka konto al la antaŭa adreso. Bv aldoni NLG 10,00 por bankaj kostoj.

Por elekti la ĝustan kotizon, bonvolu atente legi la sekvajn klarigojn:

Kotizoj validaj	ĝis 99 03 31 1-a periodo		ĝis 99 06 30 2-a periodo		ekde 99 07 01 3-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. Membro de ILEI	32	27	38	32	44	37
2. Ne ILEI-ano	40	34	48	41	56	47
3. Gimnazia instruisto, junulo, handikapulo	26	22	31	26	36	30

(La prezoj estas indikitaj en nederlandaj guldenoj!)

DIFINOJ


Membro de ILEI: tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco

Gimnazia instruisto: tiu, kiu instruas kadre de ILEI-Gimnazio dum la Konferenco

Junulo: tiu, kiu naskiĝis post 69 01 01 inkluzive

Konferenca Regularo (ekstrakto):

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.



SEKCIESTROJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana

Argentino: Teresita Alaníz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122 🖳: *esperanto@education.monash.edu.au*

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcom Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan 🖳: *zdchen@public.wh.hb.cn*

Finnlando: Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, 🖳: *raita.pyhala@lestijarvi.fi*

Francio*: Marie Malezieux-Hunninck, Batiment D5, 20 rue de Champlain, FR-84200 Carpentras

Germanio*: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario*: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa 🖳: *nlalt@konyvtar.c3.hu*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. kesto 17765-184, Teheran 🖳: *IREJO@neda.net*

Italio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma 🖳: *m.latorre@uniroma3.it*

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japanio

Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana

Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard 🖳: *ten.hagen.esperanto@pi.net*

Norvegio: Bjŏm Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000 🖳: *ab2928@mastak.sitek.ru*

Svedio*: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby

Svislando*: François Randin, Str. Vallombreuse 14, CH-1004 Lausanne 🖳: *ilei.ch@esperanto.nu*

Usono*: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 🖳:*72644.2450@compuserve.com*

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan

Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien 🖳:*klag.esperanto@online.edvg.co.at*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BIH-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región 🖳:*strigo@entelchile.net*

Danio: Wolfgang Kirschstein, Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand 🖳: *WK@cci.dk*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 94, EE-3053 Keila

Hispanio: Pedro M. Martin Burutxaga, Ctra. Estació 2 A-5-2, ES-17300 Blanes(Katalunio) 🖳:*pmarti10@pie.xtec.es*

Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak 🖳: *radp@emi.yu*

Kongo: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José 🖳: *miaumiau@sol.racsa.co.cr*

Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900 🖳: *so@kns.kangnam.ac.kr*

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1. 🖳:*Sir_Lancelot@compuserve.com*

Portugalio: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq Vale Grande PT-1675 Pontinha 🖳:*johanovero@mail.telepac.pt*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana. 🖳:*Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome

Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS 🖳: *eugeny@esper.gimli.com*

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A

Noto: *Asteriksoj indikas la landojn, kie oni ricevas la revuon tra la landa ILEI-sekcio, do kun viaj eventualaj distribuaj problemoj bv. unue kontakti la enlandajn respondeculojn.*

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: prez.: Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: Hans ten Hagen, (adreso, kovrilo 3)
Lernej-konkursa: Géza Kurucz, Hitel u.10.fszt.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario. Rete: kg@esperanto.nu
Lernej-projekta: Maŭro La Torre, Jennifer Bishop, Marija Beloševiĉ
Terminara: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio
Elekta: Doroteo Holland - Usono, Agneta Emanuelsson - Svedio, Gwenda Sutton Nov-Zelando
Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen
Kontrola: Membroj: Märtha Andreasson, Gertrud Lund kaj vic-membro: Bo Sandelin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
UNESKO (*en operaciaj rilatoj*). Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris, Francio

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto. **Kasisto de ILEI:** *Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo).* Membrokotizoj en landoj kun sekcio: a) A-kategoriaj landoj (vidu UEA-dividon): 22 NLG al la sekcio aŭ 25 NLG rekte al ILEI. b) B-kategoriaj landoj: 20 NLG al la sekcio aŭ 22 NLG rekte al ILEI. c) En landoj sen sekcio: 20 NLG, pago al ILEI rekte. d) Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a*. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8500 PÁPA, Kilián ltp. 75/9. **Retadresoj**: *nlalt@konyvtar.c3.hu* (redaktoro), *smidik@rik.bdtf.hu* (vicredaktoro). Ni ambaŭ povas akcepti faksojn per komputilo, sed avertu nin telefone antaŭ ol vi faksas. **Telefon- kaj faksnumeroj**: +36-89 315-836 (red.) kaj +36-94 320-313 (vicred.). **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 2-an de novembro, **redaktoflno por la sekva numero: la 15-a de januaro 1999.**